



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2011 numero 1-a: januaro-februaro
dissendo je la fino de decembro 2010



Fotis Claude Gacond la 31an de januaro 2010.

En niaj novjaraj promenadoj ni ofte celas la kvieton de la profunda valo, kie serpentumas la rivero Doubs. El la baraĵa lago de Biaufond elstaras triŝtata limŝtono inter Francio kaj la kantonoj Neŭŝatelo kaj Juraso, haltejo por ardeoj aŭ laroj. Eblas ĉirkaŭmigri marĉan lageton laŭ pado, el kie observeblas eĉ vintre trankvile naĝantaj anasoj, fulikoj kaj cignoj. Ni ŝatas tiun naturprotektejon kun muskoinvaditaj arboj, kies rompitaĵojn ĉirkaŭas buskoj neĝe dekoraciitaj. Kaj la silenton subite rompas kvakoj, kiam anasoj ekrimarkas nin.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils
14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32

ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2011-2 : marto-junio :

februare 10, dissendo 1-an de marto.

2011-3 : julio-oktobro :

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2011-4 : novembro-decembro :

oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2012-1 januaro-februaro :

decembre 10, dissendo fine de decembro.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Mürger, kasisto, Rue Centrale
4, 2112 Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2011-1 • Redaktis: Mireille Grosjean kaj Claude Gacond



Ĝenerala Asembleo 2011 en Lugano Hotelo Pestalozzi 26an de marto

NI OKAZIGU EVENTON EN TIĈINO !!

Nia Ĝenerala Asembleo 2011 okazos en Lugano, sude de Tiĉino, en la italparola parto de Svislando. Tie loĝas laŭ nia scio 3 esperantistoj. Kun la du novuloj ni povos konatiĝi. La tria estas la fama psikiatro Tazio Carlevaro.

La dua kialo por okazigi nian asembleon tie estas konigi Esperanton en Lugano, inviti la gazetaron, informi.

La tria kialo estas inviti la apudajn italajn gesamideanojn kaj ebligi dulandan kunvenon.

La dato : sabate la 26an de marto 2011.

Pri Lugano bonvolu vidi www.lugano.ch

La loko : Lugano, hotelo Pestalozzi.

Ni trovis tre agrablan hotelon por nia kunveno kun salono, malmultekostaj ĉambroj kaj restoracio. Ĝi nomiĝas hotelo Pestalozzi. La restoracio ne ofertas alkoholaĵojn. La adreso de la hotelo estas Piazza Indipendenza.

Pri la hotelo bonvolu vidi www.pestalozzi-lugano.ch

Ĉe la akceptejo oni parolas la italan, la francan, la germanan, certe la anglan. Pri Esperanto ni vidos...

En distanco de malpli ol 100 metroj troviĝas

- La lago
- Parko « Civico »
- Endoma parkloko
- Kongrespalaco
- Monludejo « Casino »
- Malnova urbo

Por atingi la hotelon, bonvolu uzi el la stacidomo la buson 2 en direkto de Cornaredo. Elbusiĝu aŭ en haltejo « Centro » (tria haltejo) aŭ en haltejo « Palazzo dei Congressi » (kvara haltejo). Marŝante laŭ la sama direkto kiel la buso el la haltejo « Centro », vi vidos la hotelon maldekstre.

El Arth-Goldau al Lugano estas duhora veturado. Konsekvence eblas veni al Lugano kaj rehejmenigi samtage. Tamen kelkaj deziros iom ĝui Tiĉinon. La hotelo enhavas pli ol 50 ĉambrojn kun pli ol 100 litojn. Ekzistas malsamaj prezkategorioj. La plej malmultekosta ĉambro unulita kostas 67 CHF. La prezoj inkluzivas la matenmanĝon kaj taksojn. Bv vi mem rekte mendi vian ĉambron. (Telefono de la hotelo : 091 921 46 46. Retadreso : pestalo@bluewin.ch). Bv fari rapide ! Ne forgesu anonci, ke vi partoprenos Esperanto-kunvenon !

Ni proponas al vi jenan programon (konsiderante, ke la trajno alvenas el Gotardo je 12 : 46)

Sabate la 26an de marto je 13 : 15 : komuna tagmanĝo.

je 14 : 30 (ĝis la 16a) : Ĝenerala Asembleo de SES.

Por tiuj, kiuj jam estos surloke sabate matene : interparolado per rolludoj (gvidata de Mirejo) (de la deka kaj duono ĝis la dekdua kaj duono).

Por tiuj, kiuj ankoraŭ estos surloke dimanĉe matene : interparolado laŭ diversaj temoj (gvidata de Mirejo) (de la deka ĝis la dekdua horo).

Kompreneble eblos manĝi surloke sabate vespere, dimanĉe tagmeze, ktp...

Kompreneble estas aliaj hoteloj en Lugano. Jen kelkaj ĉe la stacidomo : Gami Besso, www.hotelbesso.ch, plej malmultekosta prezo por unu persono : CHF 70.-

Hotel Montarina, www.montarina.ch, plej malmultekosta prezo : CHF 75.

Continental Park Hotel, www.continentalparkhotel.ch, plej malmultekosta prezo : CHF 95.

Art Hotel Stella, www.arthotelstella.ch, plej malmultekosta prezo : CHF 110.

Hotel Acquarello, www.acquarello.ch, plej malmultekosta prezo : CHF 110.

Ni atendas vin en Lugano !!

La Estraro.

-oOo-

**Tagordo de la
Ĝenerala Asembleo de Svisa Esperanto Societo
Tago: Sabate la 26an de marto 2011
Loko: Lugano (TI), hotelo Pestalozzi**

1. Bonvenigo, kontrolo de la ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Elekto de voĉnombrantoj.
4. Evoluo de la membraro.
5. Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Asembleo 2010.
6. Vivo de la societo : aprobo de la estrarraporto.
7. Financoj. Prezento kaj aprobo.
8. Elekto de kaskontrolantoj.
9. Projektoj por 2011.
10. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SATamikaro, Pasporta Servo k.s. Raportontoj bv anonci sin al Mirejo Grosjean antaŭ la kunveno.
11. Buĝeto 2011. Prezento kaj aprobo.
12. Diversaĵoj.

Pri la proponoj :

Ili devas atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets aŭ rete per mirejo.mireille@gmail.com aŭ Dietrich Weidmann ĝis la 26a de januaro 2011.
Proponoj devas esti subtenataj de minimume tri personoj.

-oOo-

VASTE kaj DIGNE

Pri la nuna agado rilate al informado-varbado **eksteren** :

Dietrich Weidmann, Mireille Grosjean kaj Stefano Keller sendas de tempo al tempo gazetaran komunikon al gazetoj laŭ la okazintaj aŭ okazontaj eventoj. Tia agado kostas nenion.

Mireille Grosjean preparas franclingvan dosieron dufoje jare kaj sendas ĝin al 160 establoj kaj personoj (redaktejoj de ĉiuj romandaj gazetoj, lingvaj centroj en universitatoj, politikaj partioj, Attac-grupoj, Babylonia, Lia Rumantscha, ktp.) La kostoj estas repagitaj de SES.

Internen ni havas nian revueton *SES informas*. Tiun bultenon ankaŭ ricevas interesatoj, kiuj ne aŭ ne ankoraŭ parolas Esperanton. Tiu verkado, redaktado, sendado kostas, SES kovras tiujn elspezojn.

Internen ni havas nian retliston « Svislando ». Tiu agado kostas nenion.

Ĉar la ĉefa eŭropa sidejo de **Unuiĝintaj Nacioj** (UN) staras en Ĝenevo, venas en la taskaron de SES meti homojn je dispono de UEA por reprezenti nian tegmentan establon ĉe UN. Stefano Keller kaj Mireille Grosjean verkas, presas kaj pretigas dokumentojn por informi la tiean publikon pri Esperanto. Ĝis nun ili mem pagas tion. Tiaj varbinvestaj kostoj devus esti kovritaj de SES. En alia kampo ni menciis, ke UEA nenion pagas al ili, eĉ ne repagas iliajn elspezojn por vojaĝoj aŭ manĝoj. Bonvolu noti, ke Mireille plufoje ricevis en Parizo stokon (plurfoje pli ol 100) da franclingvaj informiloj de UFE senpage ; do valora subteno.

Pormemore la sumo por informado - varbado en nia buĝeto kutimas esti je 5000 CHF.

Venis proponoj (en la enketo), ke nia informado-varbado vastiĝu,oftiĝu kaj digniĝu.

Nia revueto *SES informas* povus, devus esti sur pli bonkvalita papero kaj farita per modernaj metodoj, por ke la fotoj aperu pli bele. La komencantoj eble ricevus tiel pli bonan impreson de la movado kaj restus en ĝi.

Ni planas eventon okaze de SFERO 2011 en Richterswil (ZH).

Ni planas eventon okaze de SFERO 2014 en Vordemwald (AG).

La kostoj de iu varbado nuntempe estas enorme altaj. Pro tio ni anoncas al vi, ke nia nova kasistino Marie-Louise Mürger malfermis novan konton, kie vi povos donaci monon por subteni nian varbagadon. La konto nomiĝas VASTE kaj DIGNE kaj ĝia numero estas 12-128564-4.

Bonvolu malavare subteni niajn varbcelajn agadojn.

Elkore antaŭdankas la Estraro.

-oOo-

Pri la Fondaĵo ch

En bona artikolo en *SES informas* 2010-3 Nicole Margot priskribis tiun Fondaĵon. Mi deziras kompletigi ŝian tekston, ĉar la Fondaĵo havas diversajn facetojn.

La unua faceto, pri kiu Nicole jam parolis, estas la eldono de svisa literaturo en la serio ch.

La dua faceto estas la Konferenco de la Kantonoj. Tiu Konferenco grupigas po unu membron de la kantonaj registaroj (ekzekutivoj). Do tiu Konferenco iel similas al la Ĉambro de la Kantonoj (*Ständerat, Conseil des Etats*) sed en unu estas membroj de la registaro, en la alia estas elektitaj parlamentanoj. Tiu Konferenco laboras en Berno tuj apud la Federacia Palaco en la Domo de la Kantonoj (*Haus der Kantone / Maison des Cantons*).

La tria faceto de la laboro de la **Fondaĵo ch** estas la centra oficejo pri interŝanĝoj de junuloj (*Fachstelle Jugendaustausch / Echange de Jeunes*). Tiu centra oficejo en 2010 kreskis de 10 al 30 kunlaborantoj, ĉar ĝi ricevis plian taskon : zorgi pri la eŭropaj studentinterŝanĝoj Erasmus kaj Comenius k.s. Pro tiu kresko oni kreis novan retejon, kiu ricevis la nomon www.ch-go.ch. Pro tiu netaŭga uzo de la angla lingvo mi reagis en la gazeto « *Le Temps* » kaj sur la retejo « *Défense du français* » skribante :

Avec l'argent public. Inacceptable !!

Si vous cherchez une possibilité d'échange scolaire pour vous ou votre enfant pour perfectionner votre allemand ou votre italien, vous tapez www.echanges.ch, le site de la centrale suisse des échanges nommée « ch Echange de Jeunes ». Vous serez redirigé/e sur www.ch-go.ch, car ce centre vient de se développer en accueillant les guichets européens des grands programmes d'échanges d'étudiants.

Or cette centrale est dans les mains de la Fondation ch qui mène diverses activités très valables en Suisse. « La Fondation ch, sise à Soleure et à Berne, est une fondation de droit privé créée en 1967 et placée sous l'égide des 26 cantons suisses. Le Conseil de fondation se compose de 26 membres des gouvernements cantonaux. La mission de la fondation est de jeter des ponts entre les communautés linguistiques et de préserver la diversité linguistique et culturelle ainsi que de promouvoir le concept du fédéralisme. » (extrait du site sur la Toile)

En choisissant le nom « ch-go », la Fondation se met à l'anglais, ce qui est contraire à sa vocation. De plus, elle le fait avec le soutien financier des cantons, donc de l'argent public. Cela est inacceptable !

Il faut remarquer que la Confédération a donné le ton en introduisant le concept de « swissness ».

Les entreprises et magasins affectionnent l'anglais, ils oublient que la meilleure manière de vendre est encore et toujours de parler la langue de l'acheteur...

Si les instances publiques suisses se soumettent à la mode idiote du « tout à l'anglais », il faudra faire la révolution.

Mit öffentlichem Geld ! Unannehmbar !

Wenn Sie eine Austauschmöglichkeit für Sie selber oder für Ihr Kind suchen, um Französisch oder Italienisch zu verbessern, klicken Sie www.echanges.ch; das ist die Webseite der Fachstelle ch Jugendaustausch. Ihre Suche wird auf www.ch-go.ch weitergeleitet, weil diese Fachstelle soeben im Wandel ist, denn sie hat jetzt den Auftrag bekommen, für die europäischen Austauschprogramme für Studenten zu sorgen.

Diese Fachstelle ist ein Teil der ch Stiftung, die in der Schweiz verschiedene wertvolle Aktivitäten führt. „Die ch Stiftung mit Sitz in Solothurn und Bern ist eine privatrechtliche Stiftung und wurde 1967 gegründet. Träger sind alle 26 Kantone der Schweiz. Der Stiftungsrat besteht aus 26 Mitgliedern der Kantonsregierungen. Zweck der Stiftung ist der Brückenschlag zwischen den Sprachgemeinschaften und die Wahrung der Vielfalt von Sprachen und Kulturen sowie die Förderung des föderalistischen Staatsgedankens.“ (Aus der Webseite ch-go.ch)

Diese Stiftung hat also einen neuen Namen auf Englisch gewählt. Es ist durchaus nicht im Einklang mit ihren Statuten. Ausserdem macht sie das mit öffentlichen Geldern. Das ist unannehmbar.

In diesem Bereich hat der Bund den ersten Schritt gemacht, als der Begriff „swissness“ lanciert wurde.

Die Unternehmen, Läden und Verkaufsstellen schätzen die englische Sprache. Sie vergessen, dass der beste Weg im Verkauf immer noch ist, die Sprache des Käufers zu benutzen...

Wenn die öffentlichen Instanzen in der Schweiz von der dummen Mode vom „English only“ verführt werden, wird eine Revolution nötig sein.

Mireille Grosjean

-oOo-

Tutsvisa aktiveco

CDELI

**Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

claude.gacond@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn :

Januare 22,
Februare 19,
Marte 19,
Maje 21,

Junie 18.

Petu la detalan informilon.

Por la **Kultura Seminario**, kiun gvidas Claude Gacond, studemuloj rezervu la sekvajn sabatojn :

Februare 5,

Aprile 2.

Stud-celoj de la Seminario : Unu el la studtemoj de tiu seminario estas la vortfarado en Esperanto : Ekzameno de la gramatikaj kaj vortfaradaj hezitaj de la unuaj esperantistoj (ĝenerale propraj al ĉiuj lernantoj) kaj malkovro de la sinsekvaj decidigaj kontribuoj kaj roloj de Louis de Beaufront, René de Saussure, Edmond Privat, Hector Hodler, Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Gaston Waringhien kaj fine István Szerdahelyi. Aliaj temoj ankaŭ okupos nin : legajoj, malkovro de verkistoj, respondo al primovadaj kaj prilingvaj demandoj, ktp.

-oOo-

Raporto pri la Kultura Seminario

La sekvaj resumoj de la seminariaj kunsidoj certe instigos legantojn kreskigi la rondon de la deko da studemuloj :

Kunsido de la 2a de oktobro

Ni konstatis, ke la *Lingvo Internacia* (1887) de Doktoro Esperanto aŭ Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917), same kiel la *Universal Glot* (1868) de Jean Pirro (1831-1886) kaj la *Volapük* (1880) de Johann Martin Schleyer (1831-1912) apartenas al kategorio de lingvo-projektoj influitaj de la planlingvaj vidpunktoj de la filozofo René Descartes (1596-1650), interalie per lia letero al la Patro Mersenne de la 20a de novembro 1629, kaj de Gottfried Wilhelm Leibniz (1646-1716), interalie per lia logika alĝebro celanta la kreon de

vorttabeloj. La bibliografio aperinta en la volapuka jarlibro *Yelabuk pedipedelas* en 1898 donas ideon pri la verkoj verŝajne nerekte influintaj Doktoron Esperanto kaj ankaŭ pri la influoj de la lingvo Volapük al lia Esperanto.

Jen citaĵo el la letero de René Descartes al Patro Mersenne, de la 20a de novembro 1629 :

« Faisant une langue, où il n'y ait qu'une façon de conjuguer, de décliner, et de construire les mots, qu'il n'y en ait point de defectifs ny d'irreguliers, qui sont toutes choses venues de la corruption de l'usage, et mesme que l'inflexion des noms ou des verbes et la construction [des mots] se fassent par affixes, ou devant ou apres les mots primitifs, lesquelles affixes soient toutes spécifiées dans le dictionnaire, ce ne sera pas merveille que les esprits vulgaires apprennent en moins de six heures à composer en cette langue avec l'aide du dictionnaire. »

Esperantigo :

« Kreante lingvon, en kiu ekzistos ununura maniero konjugacii, deklinacii kaj konstrui la vortojn, ke inter ili neniu estos nekompleta, nek neregula, ĉio fontinta el uzkorupto, kaj eĉ ke la fleksio de la nomoj kaj de la verboj kaj la vortkonstruo efektiviĝos per afiksoj, ĉu antaŭ aŭ post la originaj vortoj, kies afiksoj estos ĉiuj listigitaj en la vortaro, tiam ne estos mirige, ke eĉ plebaj spiritoj lernos dum malpli ol ses horoj verki en tiu lingvo helpe de la vortaro. »

Kunsido de la 6a de novembro

Citaĵoj el konsideroj de Gottfried-Wilhelm Leibniz laŭ la verko *Histoire de la Langue universelle* (Hachette, Paris, 1903) de Louis Couturat (1868-1944) kaj Léopold Leau (1868-1943) paĝoj 23-24 :

« Toutes les idées complexes sont des combinaisons d'idées simples, de même que tous les nombres non premiers sont des produits de nombres premiers. La composition des idées entre elles est analogue à la multiplication arithmétique, et la décomposition d'une idée en ses éléments simples est analogue à la décomposition d'un nombre en ses facteurs premiers. Cela admis, il est naturel de représenter les idées simples par les nombres premiers, et les idées composées de telles ou telles idées simples par le produit des nombres premiers correspondant. [...] Toutes les vérités logiques seront représentées par des vérités arithmétiques relatives à la multiplication et à la division, comme celles de la Table de Pythagore (Ex. : $2 \times 3 = 6$), et tout raisonnement se réduira à un calcul numérique.

Pour transformer ce calcul logique en une langue, il suffit de traduire les nombres par des mots prononçables [...]. On représentera les 9 chiffres caractéristiques par les 9 premières consonnes : b, c, d, f, g, h, l, n ; et les unités décimales successives (1, 10, 100, 1 000, 10 000) par les 5 voyelles : a, e, i, o, u. Les unités d'ordre supérieur pourront être représentées par des diphtongues. Dès lors, pour énoncer ou pour écrire un nombre, il suffit d'énoncer le nombre des unités de chaque ordre décimal, en associant la consonne correspondant au

*chiffre et la voyelle correspondant à l'ordre décimal. Par exemple, le nombre 81 374 s'écrira et se prononcera : **Mubodilefa.** »*

Esperantigo :

« Ĉiuj kompleksaj ideoj estas kuniĝo de simplaj ideoj, same kiel ĉiuj nombroj ne primaj estas produto de primoj. La kunmeto de ideoj analogas inter si al aritmetika multiplikado, kaj la dismeto de ideo inter ties simplaj elementoj analogas al elmeto de nombro inter ties primoj. Kiam tio estas akceptita, tiam estas nature reprezenti simplajn ideojn per primoj, kaj ideojn, kiuj entenas tiajn aŭ tiajn simplajn ideojn per multobligo de la koncernaj primoj. [...] Ĉiuj logikaj veroj reprezentiĝos per aritmetikaj veroj rilatantaj al multobligo kaj divido, kiel tiuj de la Pitagora tabelo (Ekz. : $2 \times 3 = 6$), kaj ĉiu rezonado reduktiĝos al per-nombra kalkulo.

Por transformi tiun logikan kalkulon al lingvo sufiĉas traduki la nombrojn per prononceblaj vortoj [...]. Oni reprezentos la 9 karakterizajn ciferojn per la 9 unuaj konsonantoj : b, c, d, f, g, h, l, n ; kaj la sinsekvajn unuojn decimalajn (1, 10, 100, 1 000, 10 000) per la 5 vokaloj : a, e, i, o, u. La unuoj el supera ordo povos reprezentiĝi per diftongoj. Tiam, por eldiri aŭ skribi nombron, sufiĉas vice eldiri la ciferon de la vicaj decimalaj unuoj kunigante la konsonanton ciferan al la vokalo de la decimala ordo. Ekzemple, la nombro 81 354 skribiĝos kaj eldiriĝos : **Mubodilefa.** »

Spuroj de filozofia planlingvismo en Esperanto

Fakte en Esperanto (kiel cetere en Volapük kaj en antaŭaj lingvo-projektoj), ekzistas tiaj vortkreaĵaj tabeloj inspiritaj de la filozofiaj planlingvaj teorioj de Leibniz.

Ni prave tuj pensas al la tabelo de la korelativoj. Sed ankaŭ la alfabeteca verba finaĵaro **as, (es), is, os, us**, kun sia paralelismo partecipa **ant, int, ont** kaj **at, it, ot**, respegulas antaŭesperantajn planlingvajn projektojn, same kiel la vokalaj vortfinaĵoj **a, e, i, o, u**. Kiam mankis vokalo, tiam Zamenhof utiligis la diftongon **aŭ**, kiel finaĵon de prepozicioj kaj adverboj, kiam li sentis la neceson de eŭfonia finaĵo.

La adeptoj de la naturalismo kritikis tiujn spurojn de la filozofia planlingvismo propra al Esperanto, kaj kurioze Louis Couturat eĉ aldonis al sia projekto Ido la infinitivan serion **ar, ir, or**, kiu fakte estas malfacile uzebla. Fakte Zamenhof konservis en sia projekto nur fermitajn tabelojn kaj seriojn, kiuj montriĝis reale produktivaj. La korelativa tabelo poste tendencis eĉ al integro de la elementoj **ali** kaj **kelk**.

Kelkaj eblaj influoj de Volapük

Deklinado	Volapük	Esperanto
Nominativo :	dom.	La domo.
Genitivo :	doma aŭ de dom.	doma aŭ de la domo.

Dativo :	dome aŭ al dom.	dome aŭ al la domo.
Akuzativo :	domi.	La domon.

Persona pronomo	ob, oba aŭ de ob	mi, mia aŭ de mi
	ol, ola aŭ de ol	vi, via aŭ de vi
	om, oma aŭ de om	li, lia aŭ de li
	of, ofa aŭ de of	ŝi, ŝia aŭ de ŝi
	obs, obas aŭ de obs	ni, nia aŭ de ni
	on, de on.	oni, de oni.

Ki-vortoj

Ik (adjektivo)	Kimik → gudik	Kia → bona
Iko (maniero)	Kimiko → gudiko	Kiel → bone
Öp (loko)	Kiöp → Flentöp	Kie → Francie
Üp (tempo)	Kiüp → fanüp	Kiam → infan(am)
Kod (kaŭzo)	Kikod	Kial
Än (lando)	Kiän → Flentän, fatän	Kiu lando → Francujo, patrujo

Sufikso el	Flent → Flentel	Franc → Franco
	Yulop → Yulopel	Eŭropo → Eŭropano
	Paris → Parisel	Parizo → Parizano
	Tik → tikel	penso → pensulo
	Tid → tidel	instruo → instruisto
	gud → gudel	bono → bonulo

La tre ĝenerala volapŭka sufikso **el** verŝajne inspiris la esperantan sufikson **ul**.

Kaj la tre ĝeneralaj sufiksoj **än** kaj **el** por la landnomoj kaj ties anoj kaŭzis la falsan ĝeneralan uzon de **ujo** kaj **ano** en la unua periodo de Esperanto :

Flent → Flentän → Flentel	franc → Francujo → Francano
Sved → Svedän → Svedel	sved → Svedujo → Svedano
Ned → Nedän → Nedel	Holand → Holandujo → Holandano
Jveiz → Jveizän → Jveizel	Svis → Svisujo → Svisano

Kunsido de la 4a de decembro

Post la kolapso en 1894 de la revuo *La Esperantisto* redaktita de L. L. Zamenhof kaj eldonita de W. H. Trompeter, periodaĵo feliĉe reproduktita de Reinhard Haupenthal, la naskiĝanta esperanto-movado ne restis longe sen ĉefa organo. Jam en 1895 ekaperis en Upsala (Svedio) nova monata revuo titolita *Lingvo Internacia*, kiun feliĉe reproduktis Ludovikito en la volumoj XI, XII kaj

XIII de sia kolekto *ludovikologia dokumentaro*. Trafoliumado de tiu periodaĵo tuj komprenigas, ke ĝi favoris memstaran uzon de Esperanto ekster troa lingva influo aŭ interveno de Zamenhof mem, kio rapidigis la maturiĝon de aŭtonomaj talentoj.

Analizo de la kultura evoluo de Esperanto tra tiu grava revuo estos interalie la temo de la februara seminaria kunveno.

Paralele al sia redaktado de *La Esperantisto* L. L. Zamenhof ankaŭ dediĉis siajn fortojn al la esperantigo de la teatraĵo *Hamleto* de Shakespeare. Tiu grava kultura evento ankaŭ okazis en 1894. Samtempe Zamenhof pretigis eldonon de rusa-esperanta vortaro entenanta la vortelementojn, kiujn li devis enkonduki en la sejaran Esperanton por povi esperantigi la ŝekspiran dramon.

Fakte Zamenhof agis kiel lerta pedagogo. Ĉar liaj neologismoj estis ĉefe latinecaj kaj iom ĝermanecaj, la koncerna legaĵo neniel malfacilis por la okcidenteuropaj esperantistoj, sed la slavoj certe bezonis leksikan helpilon. Tiel esperanto senkrize riĉiĝis je proksimume trimil vortelementoj kulture absolute necesaj, kiuj ne estis proponitaj en la *Unua Libro* de 1887.

La ekpraktikantoj de la juna lingvo fiere konvikiĝis pri ties kultura kapablo, kio vekis ĝeneralan verkemon tuj percepteblan en la revuo *Lingvo Internacia*. Kaj en la formiĝantaj studrondoj ĉefe en Rusujo la grupa laŭtleĝo de *Hamleto* favoris asimilon de la proponita vortuzo kaj ankaŭ lertiĝon en la parola lingvopraktiko. Kaj propagande ekzistis nerefutebla pruvo pri la matura esprimkapablo de Esperanto mem.

Tiam ĵus estis disfalinta la volapuka movado kaj tial eksperimentiĝis novaj lingvo-projektoj ĉefe naturalismaj, kiel ekzemple *Idiom neutral*. Pri tio oni diskutis en la unuaj numeroj de *Lingvo Internacia*. Sed la vekita verkemo, eĉ ĉe lingvo-reformemulo kiel Antoni Grabowski, komprenigis, ke la vera disvolviĝo de la lingvo ne okazos tra la reformisma vojo, sed per la propra interna disvolviĝo de la latentaj fortoj kaj per traduka kaj eĉ memverka aktivecoj.

La partoprenantoj al la kunveno komparis la vortojn de la unua sceno de *Hamleto* al tiuj de la vortlisto de 1887. Tiel ili malkovris la abundon de la novaj vortoj enkondukitaj de Zamenhof. Konsulto de la *Konciza Etimologia Vortaro* de André Cherpillod montris, ke kiam latinaj kaj ĝermanaj vortoj ne proponis konvenan leksikan solvon al Zamenhof, tiam li ne hezitis inspiro el la slava vortrezoro. Tion ekzemple atestas la vorto *nepre*.

Atento ankaŭ iel turniĝis al la 9 eldonoj de la zamenhofa esperantigo, al sekvaj tradukoj kaj al esperantlingvaj eseoj pri Shakespeare kaj lia dramo *Hamleto*.

Claude Gacond.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

PC : 40-33714-4

Jarkotizo unuopa : Fr 25.-, paro : Fr 30.-

Bern

S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2,
Postfach, CH-3052 Zollikofen.

Telefone : 031 911 64 72 (kun respondilo) aŭ oficeje 031 911 23 22.

ueli.haenni@swissonline.ch

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15

Venonta kunveno

Marte 9 : Ĝenerala Kunveno.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel : 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

CCP : 10-26785-8

www.esperanto.ch/Lausanne

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20h00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann

Tel. 021 624 36 38; Vicprezidanto :

Charlotte Blanc Maillard 079 393 32 63 ;

Sekretario : François Randin 076 411 14

55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88 86.

Venontaj kunvenoj

Januare 10 : Traduko kaj teatraĵo kun Sonia Daubercies.

Februare 7 : Ĝenerala Asembleo.

Marte 7 : Pri UN kun Mireille Grosjean.

Aprile 4 : Decidota.

Maje 2 : Pri la UK en Kubo kun Christiane Andreae.

Junie 18 : Ekskurso.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.
Tel. 041 280 46 12.

Kunvenejoj

Gasthaus Adler, Gerliswilstrasse 78, 6020 Emmenbrücke. Tel. 041 281 18 38.

Gastejo **Filali**, Luzernerstrasse 6, 6020 Kriens. (Buso 1, direkto Kriens-Obernau, haltejo Linde/Pilatus) 041 320 60 86 aŭ 079 658 40 67. renata.filali@bluewin.ch

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. 041 210 25 88.

Venonta kunveno

2011 Januare 5 : Ĉe Filali 14h00-16h00 : Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Gastoj ĉiam bonvenas, sed pro eblaj subitaj ŝanĝoj konsilindas telefone aŭ rete certigi, ĉu la aranĝo disvolviĝos kiel anoncote.

-oOo-

La Tour-de-Peilz

Svisa Muzeo de la Ludoj

Kontaktabloj kun Cesco Reale:
Telefona: 041-76-234 18 43
rete: cescoreale@gmail.com

Lude kaj samideane Cesco Reale
<http://www.museedujeu.com/>

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientsvislando)
www.esperanto.ch/wil

Prezidanto: Verena Chaves-Walder,
Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere de la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venonta kunveno

Februare 2 : Ĝenerala kunveno kaj jarplanado.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.
Poŝfako 858, 8034 Zürich.
Tel. 044 251 50 25 (dum oficejaj horoj)
Poŝtkonto: 80-17287-1
<http://esperanto.ch/zuriko>.


La kunvenoj okazas en
Centro "Karl der Grosse,
Kirchgasse 14, 8001 Zürich.

Renkontiĝoj regulaj

ĉiam la lastan jaŭdon de la monato en la hejmo de Michael Roesser, Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la 20h30 (rekte apud la haltejo "Rössli-strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10 minutoj de la ĉefa stacidomo).

Informoj pri la aktuala programo de Esperanto-Societo Zuriko troviĝas en la reto sub:

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht
zuriko@esperanto.ch
<http://esperanto.ch/zuriko>



Kongresen

La lastaj esperanto-spertoj de Luko

Aalen, la Fame-premio

Dimanĉon la 10an de oktobro 2010 okazis en la urba biblioteko de Aalen en Germanujo ceremonio de la *FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj*. Transdoniĝis la 12a kulturpremio al geedzoj Halina Gorecka kaj Aleksandr Korĵenkov pro ilia persista vivolaboro: daŭra nehaltigebla eldonado kaj publikigado, ne cedante ankaŭ dum la malfacilaj tempoj, kiel ekzemple dum la samizdat-periodo en eksa Sovetunio.

Aleksandr Korĵenkov venis sola el Kaliningrad; lia edzino devis pro malsaneco bedaŭrinde resti hejme. La sabaton vespere li iom rakontis al malgranda grupo pri sia redaktado de la internacia sendependa magazino *La Ondo de Esperanto*.

Tiun aranĝon en Aalen kaj ties bankedon mi partoprenis kun plezuro, kaj dum la ceremonio de la FAME-premio mi transdonis salutojn de Claude Gacond, la unua premiito de la fondaĵo.

Estis ankaŭ speciala okazo por viziti mian koramikinon Barbara Nollen, kiu loĝas en la sama urbo.

Venis ankaŭ Marek Blahuš, ĉeĥa amiko nun loĝanta kaj laboranta por esperanto en Nancy. Estis bone revidi ilin, kun ankaŭ Inge kaj Jürgen, aliaj geamikoj renkontitaj dum kongresoj, kiuj loĝas en Aalen. Iun vesperon ili tre gastigeme kuiris por nia grupeto. Regis bona esperantista etoso.

Luc Allemand

Bicikla vojaĝo al Aalen

La lastan semajnon de oktobro mi havis feriojn kaj decidis reiri al Aalen por viziti Barbaran, sed ĉi-foje per biciklo. Aŭ pli precize per *kuŝbiciklo*!

Marde la 26an mi biciklas ĝis Biel kaj de tie trajnas al Wil, kie mi gastigas ĉe alia Barbara, kiun mi konas de kelkaj jaroj pli, ĉe kiu mi havis miajn unuajn feriojn en esperantujo kiel 15jara knabo. En tiu tempo vivis ankoraŭ ŝia edzo Stanislaw Pochanke.

Merkrede matene mi ekbiciklas, atingas Konstanz ĉirkaŭ tagmeze. Per pramego mi transiras la lagon *Bodensee*. Froste ventas, sed tamen mi havas plezuron sidi supre ekstere

en la ŝipantaŭo. Belas, tio daŭras nur dek longajn minutojn.

Post elŝipiĝo mi piknikas en Meersburg. Laŭ konsilo de iu lokulo mi preterveturas la nordan flankon de la lago ĝis Friedrichshafen, kaj de tie biciklas norden al Ravensburg. Onidire tuj norde de Meersburg estus montoj netransirindaj, jen la kialo de mia kromvojo.

En Ravensburg estas la 16a horo kaj duono ; ne tro malfrue. Mi do daŭrigas. Iom pli norde en Weingarten komencas malheliĝi kaj iĝas tempo por mi serĉi taŭgan lokon por tranokti. Mi trovis iun en *Pasporta-Servo* en Ulm por la venonta tago, sed ja neniun en tiu-ĉi regiono por hodiaŭ. Kaj estas vere tro malvarme por dormi ekstere ! Mi komencas demandi kelkajn personojn pri tranoktado privata, ne en hotelo. Iu konsilas al mi demandi en iu biomagazeneto. Mi do eniras la indikitajn butikojn de la strato, sur kiu mi jam estas. Ene mi miras vidi ĉiujn produktojn, kiujn ni havas en mia laborejo Haus Christofferus : sanproduktoj *Weleda*, trink- kaj manĝaĵoj *Demeter*, k.t.p. Mi aĉetas vinbersukon, kiu redonas al mi energion kaj iom babilas kun juna dungito. Li pripensas kaj finfine indikas al mi iun *WG*, kunloĝejo de amikoj liaj, kiuj devus esti gastigemaj. Estas ja bone havi kapablojn en la germana lingvo !

Laŭ la klarigoj de Uwe mi supreniras laŭ strato, daŭrigas supren elirante la urbeton, preter arboj ĝis mi alvenas tute supre de monteto. Noktas. Tie mi malsuprenbiciklas al la vilaĝo Köpflingen, trovas la

straton Baumgarten, laŭiras ĝin ĝis iu aparta domareto kvazaŭ en kamparo. Tie en “mondektremo” troviĝas ĉe numero unu la domo de la menciita kunloĝejo. Mi sonorigas. Junulo malfermas, min enirigas kaj gvidas al kuirejo, kie troviĝas aliaj junuloj pretigantaj *Hallowin*ajn kukurbajn kapojn. Post kelkaj klarigoj kaj prezentadoj ili bonkore akceptas min. Iu kuŝigas matracon por mi en koridoro, ni poste mendas picojn.

Mi feliĉas : mi ne volis iri en hotelon, mi celis tranokti ĉe privataj uloj, same kiel mi jam faris lastprintempe, kaj mi sukcesis. Estas interesa sperto, necesas iom da kuraĝo kaj da fido, sed tiel oni malkovras interesajn homojn kaj lokojn, oni pli firme umas la vivon.

Sekvan tagon norden al Ulm, fama urbo kies katedralo havas la plej altan sonorilturon de la mondo. Post viziteto de la urbo je la 17h45 mi daŭrigas preter la rivero Donaŭ ĝis la proksima vilaĝo Talingen (parto de Elĉingen), kie loĝas gastigantino de *Pasporta-Servo*, Emmi. Estas amuze, ke kun Emmi ni konatiĝis en Havano dum la UK 2010 matenmanĝante en hotelo.

Vendrede, lastan tagon de la vojaĝo, estas iom malpli longa etapo ĝis Aalen. Komence de la posttagmezo mi haltas en belega intermonteta urbeto Heidenheim kaj je la 16a horo atingas mian celon.

Helpe de la malnovurba sonorilturo kaj de mia memoro mi orientiĝas kaj sufiĉe facile retrovas la lokon, kie laboras Barbara, kie ŝi atendas min.

Luc Allemand

Junulara renkontigo en Bazelo 5an kaj 6an de novembro



Fotis Clemens Fries

Sur ponto inter Francio kaj Germanio.

Supre : Bruno Flochon, unu brito, Luc Allemant, Barbara Nollen, Clemens Fries. Malsupre : Johannes, Kat el Kanado, Marek Blahuš.

Jam en Kubo dum la kongreso ni parolis ĉirkaŭ tablo kun kelkaj amikoj pri sinrevendo en Bazelo, loko situanta iom en la mezo, ne tro malproksime por ni ĉiuj. Kaj efektive la unuan semajnfino de novembro okazas tie malgranda kaj neoficiala renkontiĝo dank'al la organizemo de Marek Blahuš, juna ĉeĥo momente loĝanta en Nancy.

Vendrede la 5an de novembro je la 18h10 mi alvenas per regiona trajno

en Bazelon. Tie jam troviĝas Barbara Nollen kaj Marek. Baldaŭ alvenas ankaŭ Clemens Fries el Germanujo. Ni per tramo kvarope veturas al Saint-Louis, ĉe nia gastiganto Bertrand Wick. La vilaĝo troviĝas ĉe la franca flanko.

Sabate venas Johannes (ankaŭ el Germanujo), Kat el Tiĉino (origine el Kanado) kun sia koramiko el Britujo, Bruno el Strasburgo kaj iu knabino el la regiono. Ni pasigas

bonan tagon vizitante la katedralon kaj ties turon, pupdommuzeon, kiu ege plaĉas al kelkaj el ni, kaj promenante ĉe la landlimoj de Francio, Germanio kaj Svislando. Marek Blahuš partoprenigas nin en

sia ŝatata ludo *geo-kaŝado*. Kaŝejon kaj keston li eĉ trovas sur pramo trans Rejno, kaj alia troviĝas proksime de la piedponto inter Francio kaj Germanio ĉe la germana flanko (Weil am Rhein)



Fotis Clemens Fries

Dum vizito de la bazela katedralo

Barbara Nollen, Luc Allemand, Marek Blahuš, Clemens Fries kaj antaŭe Johannes.

Nia renkontiĝo do fariĝas internacia ne nur pro la deveno de la partoprenantoj, sed ankaŭ pro la lokoj vizitataj. Vespere invitiĝas entute deko da esperantistoj ĉe Bertrand, kiu vere bongastigeme kuiradas flamkukojn por ĉiuj.

Dimanĉe posttagmeze, post vizito de la historia muzeo en Bazelo, dis-iĝas nia grupo, la homoj reiras hejmen. Nur Barbara kaj mi restas ĝisvespere, ĝuas ankoraŭ la foiron *Herbstmäss*, kaj ĉefe nian kunecon.

Luc Allemand

-oOo-

KAEST 2010, Modra-Harmónia (Slovakio)

Mélanie Maradan

Kio estas KAEST kaj kiuj organizas ĝin?

KAEST signifas *Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*. Ĝi estas aranĝo, kiu arigas fakulojn de la esperanta movado dum pluraj tagoj. Ĝia programo konsistas el kelke da partoj, nome prelegoj, trejnado, fakaj diskutoj, ekskursoj kaj, kompreneble, neformalaĵoj.

La unua renkontiĝo, tiam nomita *Konferenco AEST*, okazis en 1978 en Žilina (Slovakio). Poste sekvis ĝis 1989 kolokvoj preskaŭ ĉiu-jare aŭ ĉiun duan jaron (en Žilina, České Budějovice, Brno, Poprad, Strážnice). Finiĝis la tiel nomata unua periodo de tiaj konferencoj en 1989, ĉar mankis kaj financaj kaj personaj fortoj. Rekomenciĝis en 1998 en Prago. Antaŭnelonge transdonis la respondeculo Petro Chrdele la taskon al E@I (elparolu *e-ĉe-i*), esperinte interalie, ke ĝi venigus pli junan publikon.

E@I estas neregistara junulara organizo kerne celanta instigadon de interkultura lernado kaj kunlaboro. Ĝi okazigas seminariojn kaj trejnadajn krom zorgi pri diversaj projektoj, ekzemple starigo de interreta versio de la *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV).



KAEST 2010

La ĉi-jara renkontiĝo (14a KAEST, 18-21ajn de novembro) ĉeftemis pri modernaj teknologioj por Esperanto. Ĝi rikoltis brilan sukceson: Kaj junaj kaj malpli junaj partoprenis, entute 52 homoj el 15 malsamaj landoj amuziĝis kaj kune bildigis agrablan etoson. Mi estis la nura reprezentanto de Svislando.

Alvojaĝo

Finiĝis mia penplenega, ĉar longa, labortago en la oficejo, kaj ek Slovakien! Rapide mi dorsosakumis: kelke da vintraj vestaĵoj, fotilo, papero, skribilo kaj monujo... Utilas konservi liberan spacon – oni ja ĉiam trovas ion ajn interesan por hejmalporti, tro ofte pezajn librojn. Tuj kiam mi eniris la noktan trajnon en

Zuriko, virino alparolis min en la germana kun slava akcento. La mirinda aventuro ekis! Tute hazarde mi revidis ŝin en la trajno de Vieno al Bratislavo. Sufiĉe surprize, la plimulto de la homoj, kun kiuj mi (prov)komunikis en la slovaka ĉefurbo, sciis neniun vorton nek germane nek angle. Mi do klopodis aĉeti publikveturilajn biletojn helpe de lingva libreto. Feliĉe jam troviĝis aliaj esperantistoj en la buso, kiu kondukis min al Modra-Harmónia. Mi ne perdiĝis alilande!

Unuaj impresoj

Post oficiala malfermo – kelkaj formalajtoj pri la ja tre serioza programo – komenciĝis interkonatiĝa vespero pere de vingustumado. La ĉeestantoj alparolis unu la alian familie. Ĉi tiam, nenomata esperantisto eĉ zorgis pri mi: li oferis kaj interesan introduktrondon (kiu estas kiu) kaj konstantan plenigadon de mia glaso. Mi unuafoje plenvivis Esperantujon, renkontiĝinte je multlanda nivelo. Kvankam sufiĉe da partoprenantoj ne estis novuloj, neniam mi sentis min forlasita. Dum la vespero unue la komunumo ĝuis almenaŭ kvin lokajn vinojn (post kvin pro ia ajn kialo oni ne plu nombras), due ekkantis ne nur esperante, sed ankaŭ slovake.

Troviĝis surloke multaj nacioj, tamen ĉiuj komunikis senprobleme. Se lingvistoj permesus al mi junularan neologismon, mi dirus "mojose"! Vere valoras la penon esperantumi ne nur svislande, sed ankaŭ aktiviĝi en la mondskala movado, almenaŭ por konstati, ke eblas por kelke da uloj gluti kaj eĉ ŝati vinagran harington matenmanĝe! Iomajn subitajn surprizojn mi spertis. Diru ni, ke mia vivridpunkto tiel riĉiĝis.



Katarína Nosková (sk) zorgante pri la alvenantoj.

Faka programo

Krom agrabla etoso kaj bongustaj manĝaĵoj, KAEST ebligis al mi aŭdi nekutimajn homojn ĉu pri iliaj labor- aŭ studspertoj, ĉu pri iliaj personaj

projektoj. La plimulto de la uloj estis aŭ lingvistoj aŭ komputilistoj. La varia programo ampleksis proksimume 30 prelegojn. Bedaŭrinde okazis ĉiam du prelegoj samtempe, tiel ke malfacilajn elektojn oni devis trafi.




Teo-kafo-bufedo funkciis senpage dum la tuta aranĝo, ĉu tage...




... ĉu nokte.

Je la komenco de la aranĝo eblis ricevi praktikan trejnadon pri Vikipedio kaj komputiloj, danke al kiu mi finfine scipovas instali esperantajn klavaron, literum- kaj gramatik-kontrolojn ĉe mia propra portebla komputilo. Mi eĉ renkontiĝis kun la programistoj de kelke da tiaj helpiloj, ties haveblo estas kaj restos senpage.



Trejnado en la komputilejo.

Dum la prelegtempoj mi multe aŭskultis pri komputa lingvistiko, starigo kaj administrado de ĝenerallingvaj vortaroj kaj ankaŭ iam kaj tiam pri terminologio (mia profesia fako krom tradukado). Alivorte pri paraleligado de plurlingvaj tekstaroj kaj ties utiligado, malsamaj maŝintradukadaj teknikoj, projektoj pri komunaj retaj interfacoj (ekz. ViVo, Vikia Vortaro, kiu traserĉas ReVo-n, Vikipedio-n, Majstro-n, Lernu-n kaj Komputeko-n). Aliteme lerneblis pri speleologio, publikparolado, metalaj materialoj, poŝtelefonoj, sonlibroj, KER-ekzamenoj, robotoj, fiask-sekureco, kuracaj plantoj, kaj tiel plu. Resume estis impresiga, riĉega tagordo. Kvankam tiom da fakvortoj kaj imponsonantaj lekcioititoloj, tamen la prelegantoj ĉiam parolis kaj klare kaj interesige pri la fakoj, ofte montrantaj konkretajn ekzemplojn surekrane.



La partoprenantoj seriozumas en prelegejo.

Cetere okazis sabatvespera kunsido pri terminologio. Daŭris vigla diskuto pri venontaj terminologiaj paŝoj en Esperantujo. Krom videbligi la haveblajn retaĵojn pri terminologia laboro, (esper)ebla enretigo de la *Terminologia gvidilo* (traduko de verko de Heidi Suonuuti el TC37 de la Internacia organizo pri normigado ISO) kaj kreado de baza reta sciotesto, konkretajn unuanimajn decidojn oni ne reale alprenis.


Ĉar mi estas terminologo, pluraj partoprenantoj alparolis min por levi demandojn pri terminologia laboro en aŭ pere de Esperanto. Honeste konfesu mi, ke mi ne ĉiam povis formuli trafan respondon. Nun mi alfrontas la defion

riprensi nemalgrandajn sciigpetojn. Ĉiukaze estis senkompara eblo konatiĝi kun interesuloj kaj kun malsamspertaj, lertaj homoj.

Ekskursoj

Eblis ekskursi dufoje dum la aranĝo. Ĉar mi neniam estis Slovakie, mi decidis partopreni ambaŭ vojaĝetojn.

Kadre de la unua duontaga promenado, ni umis cirkaŭ la KAEST-ejo, en kastelo kaj en ceramikaĵa metiejo. Per buso ni veturis. Je la alveno al la unua haltejo, la fortikaĵaro de *Červený Kameň* [Ruĝa Ŝtono] tute ne videblis pro la nebulego. Ni eltenis tiun elreviĝon ĝuante ĉiĉeronatan viziton. La slovakon gvidiston daŭre kaj flue buŝtradukis al Esperanto la organizanto de la ekskurso. Ni eniris la konstruaĵon kaj longe vizitis multajn ĉambrojn, inkluzive kelojn.



La kastelo... sen nebulo!

Post la vizito de la kastelo ni reeniris buson por veturi al la eta urbo de Modra, kies fieraĵoj enhavas ne nur vinojn, sed ankaŭ ceramikaĵojn. Kiam ni alvenis, mankis elektro je la ceramikilo, tiel ke ne eblis por la ceramikisto montri al ni potfaradon. Li eliris, reeniris, eliris, reeniris, grumblante iam kaj tiam en la slovakaj (voĉburoj ne estis oficiale tradukitaj). Ankoraŭ ne funkciis elektro. Finfine li skuis iel ajn la elektran kablaron, unufoje, dufoje, bone, je la turnigilo denove proviziĝis elektro! Fidindaj estas elektraj instalaĵoj en Slovakio! La ceramikisto naskis kruĉon antaŭ miaj atentaj rigardoj. Ŝajnas, ke por li tre facilis manipuli la knedeblan substancon. Tre rapide pretas sendifekta objekto kaj oni invitas nin piediri ĝis la vendejeto...



Isto laboras en sia ceramikaĵa metiejo, unu el la fierajaĵoj de Modra.

Por la dua ekskurso estis decidita iri al Smolenice, sed pro organiza kialoj ŝanĝiĝis al Bratislavo. Tiu ankaŭ duontaga promenado inkluzivis piediradon ĉirkaŭ la kastelo kaj en la urbocentro. La partoprenantoj ĝuis kristnaskan marketon kaj ties varmajn trinkaĵojn (ekz. punĉon). Poste finiĝis la renkontiĝo.



La placego antaŭ la kastelo de Bratislavo – malantaŭe videblas, aliflanke de la Danubo, grandaj komuniststilaj konstruaĵoj.



La kastelo de Bratislavo

Resume

KAEST 2010 ebligis konatiĝon aŭ revidon de fakuloj, kunuzon de spertoj kaj plej ofte gufujajn babiladojn. Estis mia unua internacia renkontiĝo kaj mi nek minutojn nek sekundojn pripentis mian aliĝon al ĝi. Mi malkovris kvazaŭ paralelan mondon plene je aktivuloj kaj simpatiuoj. Homoj kun indaj ideoj, gravaj projektoj, kiuj tute simple donackomunikas pri siaj spertoj kaj konoj. La kvartaga evento estis malfermita, ĉiuj povis partopreni, eĉ al novulo kiel mi oni ofertis la eblon prelegi. Foriĝis ĉiuj duboj, ĉu indas umi internacie en Esperantujo. Ĉu por instrui kaj dumtempe steluliĝi pri via fako, ĉu por laboreme lerni, vi ankaŭ planu aliĝon!

KAEST ripetiĝos en 2012. Se vi tamen ne volas atendi tiom longe por eniri tiel interesan entuziasmul-mondon, pripensu vian partoprenon en Vikimania – en renkontiĝo kies celo estas festi la dekjariĝon de la esperanta Vikipedio. Ĝi okazos ekde la 26a ĝis la 30a de oktobro 2011 en Svitavy (Ĉeĥio).



Toon Witkam (nl) kaj Jacob Nordfalk (dk) komputilumas.

Cetere

KAEST 2010 : oficiala retejo de la aranĝo, <http://www.ikso.net/kaest>

E@I : organizo, kiu zorgis pri la aranĝo, <http://www.ikso.net>

Vikimaniao : festu en 2011 la dekjarigo de la esperanta Vikipedio, <http://www.esperanto.cz/eo/akce/vikimaniao-355.html>

Prelegkolekto aperos en la printempo 2011.



Konstantin Obratsov (ru), homo kun esperanta flago.

Pri la packongreso en Oslo


Korekto

Kontraŭe al nia raporto en la lasta bulteno *SES informas 2010-4* paĝoj 16-17, ne esperantlingve, sed en la angla lingvo, Mireille Grosjean laŭtlegis la mesaĝon de la japana pacbatalanto Mitsuo OKAMOTO.

Morto

Arthur Baur-Sallenbach

19.2.1915 – 17.9.2010



En la pasinta numero 2010-4 de *SES Informas* ĉe la paĝo 18a, adiaŭe al mia radio-kolego Arthur Baur mi atentigis, ke jam ekde sia 15a jaraĝo li nelacigeble komencis sian poresperantan aktivecon, kiun fakte la tutmonda esperantistaro ĉefe konis tra la kanalo de la kurtondaj elsendoj de Svisa Radio Internacia ekde 1947 ĝis 1992, kaj ankaŭ per liaj publikaĵoj esperantlingvaj.

En Svislando mem la esperantistaro ĉefe konis Arthur Baur per liaj skribaj kontribuoj al la vivo de Svisa Esperanto-Societo, ĉar li malofte ĉeestis la asembleojn mem de la societo, antaŭ ĉio pro troa profesia okupiteco, sed ankaŭ ĉar karaktere li ne estis movadulo kunsidema. Tial la societo, kiun li tiom efike helpis per siaj skribaĵoj, malofte havis la ideon lin inviti por prelegi okaze de tutsvisa aŭ regiona renkonto. Fakte mi mem neniam havis la okazon aŭdi lin

oratori dum esperanto-aranĝo, kontraŭe al lia radio-kolego Edmond Privat, kiu ŝatis frekventadi kunvenojn.

Jam en 1959 SES esprimis al Arthur Baur sian dankemon pro la efiko de lia poresperanta laboro per la titolo de honora membro. Siavice UEA ankaŭ atribuis al li tiun honortitolon en 1980.

Estas fakte en 1933 en sia 15a jaraĝo, ke Arthur Baur ekpartoprenis la SES-vivon per ĉeesto en Ĝenerala Kunveno. La sekvan jaron li travivis sian unuan Universalan Kongreson en Stokholmo. Dum la kriza periodo de la Dua Mondmilito li helpis al SES kiel vicprezidanto, tio ekde 1939 ĝis 1942, kaj poste li transprenis la redaktadon de ĝia organo *Svisa Espero* ekde 1951 ĝis 1962.

Kiel profesia ĵurnalistoj li alportis sian helpon okaze de 3 Universalaj Kongresoj, tio estas de la 31a kaj 32a, kiuj okazis en Berno ĵus antaŭ la milito en 1939 kaj tuj post la milito en 1947, kaj de la 64a, kiu disvolviĝis en Lucerno en 1979, prizorgante ĉiam kun granda efiko ilian gazetaran servon.

Estas okaze de la dua postmilita berna kongreso de 1947, ke Arthur Baur ankaŭ ekdeforis kiel radio-preleganto por la kurtonda radio-servo kun Edmond Privat, la fondinto de Radio-Genève. Fakte ilia porradia aktiveco baldaŭ oficialiĝis favore al regulaj ĉiusemajnaj prelegoj en Esperanto por la Svisa Kurt-Onda Radio, kiu baldaŭ nomiĝos Svisa Radio Internacia.

Post la lucerna UK de 1979 la svisa esperanto-vivo travivis tristegan krizan periodon sekve al atakoj de Kurt Greutert, la ĉefa kongres-organizinto, pri financaj atakoj kontraŭ SES kaj UEA. Tiam en 1980 Arthur Baur transprenis la prezidon de SES kaj la redaktadon de ĝia organo, kies titolo estis fariĝinta *Svisa Esperanto-Revuo*. Li havis la iluzion, ke per sia aŭtoritato li kapablos trovi solvon al tiu konflikto, sed en 1986 li senespere esprimis al mi sian seniluziigon. Alproksimiĝis la centjariĝo de Esperanto sen projekto de jubilea festo pro la daŭrigo de la nesolvita konflikto, kiu demisiigis la svisan esperantistaron. Tiam mi akceptis helpi al mia radio-kolego transprenante la prezidon de SES kun nova kunlaborantaro absolute ekstera al la financa konflikto, kiu baldaŭ solviĝis per tribunala kondamno de Kurt Greutert.

Ekde tiam, kun la konsento de Arthur Baur, la aktiveco de SES esprimiĝis per nova organo titolita *SES informas*, kiun mi plue redaktas.

Mi raportis pri tiu peniga periodo por komprenigi, kial la prezida periodo de SES de Arthur Baur ne povis esti fruktodona. Estontaj historiistoj tiel ne povos kulpigi lin pri la kvazaŭa neniigo de la SES aktiveco dum tiu trista periodo. Fakte Arthur Baur estis ekstera al la konflikto. Nur kiel ĵurnalistoj li estis helpinta al la prikongresa diskonigo. Kaj SES mem ankaŭ estis ekstera al la krizo. Kiel konkludis Arthur Baur okaze de trankvila diskuto pri tiu periodo, tiu krizo, kiu venenis la esperanto-vivon dum deko da jaroj, rezultis el la organiza malforteco de la kongres-planintoj. Homoj ja sindonemaj, sed kiuj laboris en cirkonstancoj jure ne sufiĉe precizigitaj.

Ĉiam en rilato kun la ĵurnalista aktiveco indas menciigi la modelan agadon de Arthur Baur favore al eldonado de la porgazeta informilo *Esperanto-*

Information, kiun li redaktis germanlingve de 1954 ĝis 1987. Alportis sian efikan helpon al la francigo kaj dissendo de tiu organo René-William Perrenoud en Neuchâtel. Ĉiuj redakcioj de la svisa gazetaro, same kiel radio-elsendejoj, ricevadis kun granda reguleco tiun informan folion. En CDELI la rikoltitaj priesperantaj gazet-artikoloj atestas, ke la redakcioj kolektis tiun informilon kaj pli malpli regule publikigis la proponitajn artikolojn. La 160 numeroj de tiu informilo en versioj germana kaj franca estas konsultebaj ĉe CDELI.

Koncerne al aliaj esperanto-publikaĵoj de Arthur Baur ni menciuj lian kurson *Esperanto in 5 Lehrbriefen* (1942) kaj *Esperanto per Post* (1958 kaj 1963), la SJW-kajeron *Deine zweite Sprache* (1960), *Von der Utopie zur Wirklichkeit – Geschichte der Plansprachen* (1976). Sed liaj ĉefaj verkoj estas la *Svisa Antologio* (1939) aperinta okaze de la 32a UK, kaj *La fenomeno Svislando* (1979) aperinta okaze de la 64a UK. Poste tiu ĉi verko konis tradukajn eldonojn en aliaj lingvoj.

Fakte Arthur Baur povas esti konsiderata kiel la plej altnivela lingvisto, kiun la svisa esperantistaro konis ĝis nun. De 1933 ĝis 1940 li studis la germanan, retoromanĉan, anglan kaj islandan filologiojn en la universitatoj de Zuriko, Upsala, Stokholmo kaj Parizo, li staĝis en Londono kaj doktoriĝis en 1940 per disertacio pri la *adjektivo ĉe Boethius de Notker*. En 1941 li diplomiĝis pedagogie kiel gimnazia instruisto pri la germana kaj angla lingvoj.

Sed la sekvan jaron komenciĝis lia ĵurnalista kariero kiel redaktoro de *Wochenblatt von Pfäffikon* (1942-1945), li daŭrigis sian laboron en Berno kiel redaktoro pri la eksterlandaj aferoj ĉe *Neue Berner Zeitung* (1945-1959) kaj poste kiel ĉefredaktoro (1959-1967) kaj fine li fariĝis la ĉefredaktoro de la taggazeto *Der Landbote* en Winterthur (1967-1980).

Rilate al la asocia vivo Arthur Baur aktivis en la organizaĵoj Svisa Ĵurnalista Asocio, Berna Ĵurnalista Societo kiun li prezidis, kaj Zurika Ĵurnalista Societo. Li membris en diversaj komitatoj, interalie de Svisa Ĵurnalista Unuiĝo, de Verein Schweizerdeutsch, de la svisa aŭtorrajta asocio *Pro Litteris*, kaj en la Svisa Nacia Unesko-komisiono.

Kiel verkisto lin konigis pluraj libroj, inter kiuj : *Schwyzertütsch, Grüezi mitenand, Praktische Sprachlehre des Schweizerdeutschen*, kiu estis je sia 12a eldono en 2002, *Was ist eigentlich Schweizerdeutsch?* (1983).

Ankaŭ famigis lin verkoj koncerne al la retoromanĉa lingvo: *Allegra genügt nicht! Rätomanisch als Herausforderung für die Schweiz* (1996), *Viva la Grischa: ein Wegweiser für das Bündnerromanische* (1997). Ankaŭ en Esperanto Arthur Baur verkis pri la retoromanĉa lingvo.

Kun Edmond Privat, Arthur Baur partoprenis en la Svisa Packonsilio kaj en la Svisa Asocio por Unuiĝintaj Nacioj.

Fine ankaŭ menciindas la *Ekspozicio pri Esperanto*, kiun li helpis organizi en Berno en la Svisa Nacia Biblioteko en 1953.

Claude Gacond

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel,
rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Kuris lupoj laŭ la stratoj ...

Stanislavo Belov

Stanislavo Belov estas lokhistoriisto el Tjumenia provinco (Siberio, Rusio) kaj laboras en la loka muzeo deponit de 1995. Li verkis artikolojn pri la historio de la juda komunumo, politikaj persekutoj de la jaroj 1920-1950-aj, loka regionstudado, industrio ktp. Entute li publikigis pli ol 30 sciencajn kaj pli ol 30 sciencopopularajn artikolojn. En 2009 aperis lia unua libro (artikolaro).

Hodiaŭ estas malfacile mirigi loĝantojn de la siberia urbo Tjumeno per nekutimaj veturiloj. El urbaj transportiloj ni apenaŭ vidis metroon kaj tramon. Tamen estis en la tjumena historio du ekzemploj, kiam nian urbon vizitis efektive unikaj « veturiloj ». Cetere tio estis tre, tre antaŭlonge...

La elefanto en ledaj botoj

Ni ĉiuj scias, ke elefanto estas bonega veturilo – por ĝangalo. Facile malsovaĝigebla kaj lernebla, tiu besto iĝis plej malnova buldozo kaj kamiono. Azia elefanto senprobleme transportas sur sia dorso ŝarĝon ĝis

600 kg kaj ŝovas multmetrojn longajn arbegojn. Tamen nur malmultaj scias, ke tia elefanto foje vizitis Tjumenon kaj alvenis tien ĉi ne en la kamiono de vaganta cirko, sed per siaj piedoj, trapasinte laŭ siberiaj vojoj centojn da kilometroj...

Tio okazis en la malproksima jaro 1831. Cetere la kerno de la afero konsistas ne en antaŭlongeco de eventoj – ja mamutoj ĝis tiu tempo jam formortis kaj ties senharaj parencoj preferis loĝi pli malproksime de tiuj malvarmaj lokoj. Do la elefanto alvenis al ni de la sudo, el la fora urbo Kokando, situanta en la okcidenta parto de Fergana valo. Tia ĥano decidis ĝojigi la rusan imperiestron, sendinte al li kiel donacon la azian ekzotikaĵon – elefanton el la propra bestejo. Fervojoj tiutempe en Rusio ne ekzistis, la pezo kaj la dimensioj de la ŝarĝo sendube superis eblecojn de plej fortaj tirĉevaloj. Do la elefanton oni forsendis al Sankt-Peterburgo: piede.

Eskortita de la ĥanaj senditoj, ĝi iris tra Petropavlovsko ĝis Tjumeno kaj de tie ekiris al la gubernia ĉefurbo Tobolsko. La 24-an de aŭgusto neordinara procesio alvenis tien kaj

haltis por longa paŭzo. Tobolskanoj konstruis por la elefanto vastan kabanon kun ligna planko kaj ĉiutage nutris la eksterkutiman beston per kvar pudoj da greno (64 kg).

Sed ve, post 77 tagoj alvenis la sciigo pri fiasko de la diplomatia misio. La rusa imperiestro ne plu deziris akcepti nek senditojn de la kokanda ĥano, nek ties donacojn. La 10-an de oktobro la ekzotika kolono ekiris reen. Ŝajnas, ke aziaj gastoj jam nemalbone alkutimiĝis al la siberia klimato kaj do la elefanton ili preparis ĝisfunde al longa vojo. Por la giganto oni kudris lanan mantelon kun ŝaffela substofa kaj anstataŭ « pneumatikaj tegaĵoj » surpiedigis ledajn botojn. Tamen alkutimiĝinta al la komforta kabano, ĝi de tempo al tempo lasis la itineron kaj impetis reen, al la varma ĉevalejo en proksima vojstacio. Verŝajne tio estis la unua kaj lasta okazo, kiam sur la Tobolska landvojo oni povis vidi eskortantojn kun lancoj enmane persekutintajn la elefanton en ledaj botoj...

Rusa taĉmento kondukis la bestegon ĝis la arbaro Ĝeti Konur situanta apud la urbo Karaganda. Oni scias, ke la 11-an de decembro ĝi trairis la urbon Akmolo. Plue la spuroj de la siberia pioniro perdiĝas en la sablaro de Turkeŝtano.

La paro de grizaj « trotĉevaloj »

El la desegnofilmo « Ferioj en Prostokvaŝino » – ŝategata de ĉiu rusiano – ni scias, ke en Rusio estas ne nur rajdoĉevaloj, sed ankaŭ rajdokatoj kaj eĉ rajdoakademianoj.

Tamen jungitaro, alveturinta nian urbon antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj, ŝokis eĉ spertajn vojaĝistojn. Kaj tion kaŭzis eĉ ne la malgrandeco de la ĉareto aŭ la nekutima familinomo de la ĉaretisto – Iosif Repeĉek – Tjumeno ja multon vidis. Simple tiutage, timigante kontraŭirantajn ĉevalojn, terurigante hundojn kaj ŝokante frostiĝintajn burĝojn laŭ urbostratoj kuris... du junaj lupoj, tirantaj la ĉareton kun la viro sidanta en ĝi.

Tiu ĉi historio komenciĝis ĉirkaŭ 1904 kaj post kelkaj jaroj finiĝis tragike por ties ĉefaj herooj. Tiujare ĉeĥa lutisto Iosif Repeĉek revenis al la urbo Ĉita post laŭvica veturado laŭ najbaraj vilaĝoj. Bedaŭrinde proksime preterkuris luparo, kiu taksis la aperon de la neparhufulo sur sia tereno kiel la signalo al tagmanĝo. Malfeliĉa ĉevaleto estis forŝirita de la grizaj rabobestoj, tamen la kuraĝa metiisto sukcesis poste forkurigi la bestaron, mortiginte ĉe tio lupinon. Kiel trofeon li prenis al si la du lupetojn el lupkuŝejo, taksinte tion la justa rekompenco kontraŭ sia perdo. De tiam anstataŭ ĉevalo Repeĉek disveturis per tiuj ĝemeloj, alkutimiginte ilin kuri en la jungaĵo. Foiroj, histrionejoj, popolaj festoj – la entreprenema ĉeĥo ĉeestis ĉie kun siaj grizaj « trotĉevaloj ». Printempe en 1909 Repeĉek ekveturis por mirigi la ĉefurbon de la Rusia imperio – Sankt-Peterburgon – decidinte traveturi per siaj lupoj la tutan landon. Li ne havis kaŭzojn por tro hasti – kun tia bestaro ja famo estis al li garantiita – do en ĉiu vilaĝo aŭ urbo li haltis por veturigadi infanojn kaj

aranĝi spektaklojn kontraŭ modesta pago. La rapido de la ĉareto, kies forto egalas al la du lupaj povoj, estis

averaĝe 60-70 verstoj tage laŭ bona vojo kaj iom mapli laŭ malbona.



Repeĉek kun lupoj

Somere 1910 la « arbara frataro » alkuris Tjumenon, kie la tutan kompanion fiksas la loka fotisto Rodionov. Verŝajne tio estis la lasta fotoĵo de la metiisto-vojaĝisto. Apenaŭ forlasinte Tjumenon, Repeĉek malsaniĝis kaj baldaŭ forpasis en la apuda vilaĝo Uспенка. Liajn « trotĉeva-

lojn » prenis al si la vilaĝano Riĵkov, sed ili tre sopiris sen sia mastro kaj nur mallonge postvivis lin.

Kaj nun malnovaj urboloĝantoj ankoraŭ longe ridigis nepojn per rakontoj pri la lupa jungitaro, kurinta laŭ la ĉefaj stratoj de Tjumeneno...

La eternaj angloj

Reto Rossetti

Ĉi tiu humura priskribo de anglaj kutimoj en lingvo kaj tradicio unue aperis en « la nica literatura revuo » n-ro 5/2, paĝoj 62-64.

Kiel konate, la angloj loĝas en Anglujo. Ilin disigas de Eŭropo 40 kilometroj da markolo kaj alta monto da memestimo. Laŭ angla vidpunkto

la homaro parolas du lingvojn: angle kaj fremde. La fremduloj iom post iom lernas la anglan lingvon, por kiu la ceteraj lingvoj estas surgato, kaj finfine la tuta homaro posedos la solan lingvon imageblan por ĝusta homo. Ĝi ankaŭ estas la sola lingvo, kiu skribas « mi » kun majusklo.

Tiu lingvo estas kompreneble perfekta. Inter ĝiaj amindaj ecoj

estas tio, ke aŭdinte novan vorton oni devas serĉi en la vortaro ĝian ortografion, kaj vidinte novan vorton oni devas serĉi en la vortaro ĝian elparolon. Ĝi havas nek refleksivan pronomon nek subjunktivon, kaj la futuro kaj kondicionalo havas po du formoj, kiujn scias manipuli la sudaj angloj, sed nek la nordaj angloj nek la skotoj nek iu alia.

Mankas vorto por « homo » kaj « naski », sed kompanse troviĝas tridek sep manieroj diri « ĉu ne ». La lingvo portas 22 vokalsonojn, la frazo havas fiksan vortordon, kaj la sama vorto povas esti substantivo, adjektivo aŭ verbo laŭ sia lokiĝo en la frazo. Tio ĉi kondukas al multaj amuzaj miskomprenoj kaj amasaj ebloj de vortludo.

Por aliaj lingvoj, kiuj estas fonetikaj, akcentregulaj, posedas refleksivon ktp., la angloj havus kompaton, se ili entute ion sciis pri ili. La kelkaj angloj, kiuj lernas fremdan lingvon, sin sentas renegatoj, sed sian kulpon ili malpezigas, plibonigante la fremdan lingvon per angla prononcado kaj angla gramatiko. Tio faras ĝin pli kultura.

Al la pitoreska kaoso de sia lingvo la angloj aldonas aliajn ĉarmajn kaosojn. Oni povas diri entute, ke por kaoso la angloj havas specialan talenton. Ĉe la mono, kvar oboloj faras unu pencon, dek du pencoj unu ŝilingon kaj dudek ŝilingoj unu pundon; sed oni pagas la plikostajn artikolojn per gineoj, kiuj estas neekzistantaj moneroj. Oni montras sian estimon al sinjoro per la titolo Eskviro, same neekzistanta, ĉar oni nur skribas ĝin kaj neniam ĝin diras.

La mezursistemoj por volumeno, pezo kaj longo estas tiel komplikaj, ke ĉiu anglo, fininte lernejon, jam forgesis ilin kaj uzas kalkultabelojn. Simile labirinta estas la angla eduka kampo, kiu ampleksas dudek naŭ specojn de lernejo. Oni nomas tion « eduka sistemo » kaj, kun supera logiko, oni nomas la privatajn lernejojn « publikaj ».

La angloj amas la bestojn kaj antaŭ ĉio la hundojn. Kiam la rusoj suprensendis hundeton en sputniko, miloj da geangloj protestis furioze al la ĵurnaloj, deputitoj kaj rusa ambasado; sed kiam la usonanoj suprenpafis simion oni apenaŭ atentis, ĉar simio tro similas homon. La usonanoj tamen iom riskis kaj estonte ili farus pli prudente, ekspedante pigmeon aŭ orfon.

Oni scias, ke la angloj estas lakonaj kaj modestaj. Ili elokvente klarigas sian lakonecon kaj verve informas pri sia modesteco. Ili estas ankaŭ flegmaj, kaj tre ekscitiĝas, se tion vi ne volas kredi.

Ili amas la simplan anglan kuiradon, kiun ili manĝas tre rapide, ĉar estas iel nedece okupiĝi longe pri la sinnutrado. Ili same rapidadas tra siaj stratoj kun urĝa celo, ekzemple al kontoro aŭ kinoteatro, kaj ili ne imagas, ke strato povas esti renkontejo, restoracio – babilejo, aŭ interhomaj rilatoj grava tagokupo. Ankaŭ la restoracioj havas signon de urĝeco: oni rapide glutas sian manĝon kaj transdonas sian seĝon varma al la postveninto. Oni faras tion des pli volonte, ke temas pri simpla angla kuirado.

Oni tamen ne pensu, ke la angloj ne ŝatas Eŭropon. Ĉiam pli amase ili vojaĝas tien, kunportante en falango sian lingvan medion kaj gvidate al turistaj hoteloj, kiuj garantias la simplan anglan kuiradon. Multaj angloj, verdire, ankaŭ aventuras pri kontinenta kuirarto, indulge ĝuas ĝin, eĉ konsentas pasigi ĉe ĝi pli ol dek kvin minutojn, sed tio kompreneble estas libertempo, kaj post la frivolo ili revenas al la sobra angla rutino aŭ, kiel ili sprite ĝin nomas, « vivmaniero ». Tiu vivmaniero estas pli bone organizita, ĉar oni manĝas en unu loko kaj trinkas en alia, anstataŭ fari ambaŭ konfuze en la sama ejo.

Apartenas ankaŭ al la enviinda angla organizado, ke ĉiuj butikoj fermiĝas je la kvina, ĉar ankaŭ la butikistoj devas fari siajn aĉetojn, kaj ĉiuj drinkejoj kaj amuzejoj fermiĝas je la deka vespere, ĉar ties komizoj devas ankaŭ amuziĝi. Kiel ili faras tion, estas profunda angla sekreto.

Alia aminda angla moro estas fermi ĉiujn drinkejojn inter la dua tridek kaj la sesa horo ĉiutage. Tio efektive ĝenus, se Anglujo havus varman klimaton, sed feliĉe, kiel ĉiu anglo vin informos, oni havas klimaton moderan. Pro tiu klimatmodero anglaj viroj promenas somere sen ĉapelo kaj ricevas sunfrapon. Kaj pro tiu sama klimatmodero ĉiuj anglaj domoj portas la defluilajn tubojn ekstere, kie ili krevas de frosto en la vintro. La milda klimato ankaŭ faras nenecesa la centran hejtadon, kaj sufiĉas bruligi karbon en aperta fajrujo en ĉiu ĉambro de la domo por krei ampleksan varmon, precipe se

oni sidas proksime al ĝi aŭ, prefere, tenas la manojn super la kamentubo sur la tegmento.

Estas angla aksiomo, ke tio, kion oni faras en aliaj landoj, reale ne ekzistas. Sekve ĝi ne helpas al anglaj problemoj, ekzemple ĉu gea edukado estas praktika. La fakto, ke de longe ĝi estas ĝenerala en Skotlando, nenion signifas, ĉar Skotlando estas parto de Fremdujo.

Eĉ io farita en Anglujo de neangloj ne havas efektivan gravecon. La romianoj en la jarcentoj I-IV konstruis ĉi tie rektajn vojojn, sed ili evidente ne komprenis la indiĝenan animon, ĉar ĉiuj postaj vojoj zigzagis kaj serpentumis eĉ sur plej plata ebena. Nur kiam la angloj mem faras ion, nur tiam ĝi eniras en la realon. Apud Preston oni ĵus elkonstruis belkurban aŭtovojon. Ĝi estas longa tutajn 15 kilometrojn. Sendube la monda gazetaro jam raportis frontpaĝe pri tiu sensacia avangardaĵo.

Sed unue kaj laste la anglo estas tolerema. Tial mi povas verki senpune ĉi tiun artikolon. La angloj, kiuj ĝin legos, nur ridos senĝene, ĉar ili ŝatas la komplimenton esti temo de artikolo, kaj la pinta enhavo ilin ne tuŝas, ĉar tio estas kutima petolo de humoristo. Kaj ili komprenas, ke ankaŭ humoristoj devas esti, same kiel fremduloj, rektaj aŭtovojoj, metra sistemo kaj simila ekzotikaĵo. Ĉio tio kontribuas al la bunteco de la vivo, farante dekoracian kadron por la solida realo de la angloj en sia Anglujo.

—oOo—

La radioelsendoj de Claude Gacond

Claude Gacond dum tridek jaroj estis kunlaboranto de la Svisa Radio Internacia kaj ĉiusemajne preparis unu aŭ du elsendojn en esperanto kun sia edzino Andrée. Nuntempe li publikigas la tekstojn kaj son-dokumentojn per sia retpaĝo :
<http://www.esperanto-gacond.ch>,
rubriko Radioprelegoj.

Jen memore al tiu aktiveco kiel ekzemplo la 423-a radioprelego de la 17-a kaj 20-a de novembro 1971.

William Auld kaj Kálmán Kalocsay

Cl. Parolas gesinjoroj Claude (Cl.) kaj Andrée (A.) Gacond.

La 6-an de oktobro Kálmán Kalocsay festis sian okdekjariĝon.

A. Tri tagojn antaŭ lia naskiĝfesto okazis en la svisa urbeto Renens apud Lausanne Kultura Semajnfino Esperantista, kiu grupigis centon da partoprenantoj venintaj ne nur el Svislando mem, sed ankaŭ el Italio, Francio, Nederlando kaj Danlando.

Cl. Unu el la prelegantoj, Henri Vatré, parolis dum du horoj pri la Budapeŝta Skolo, kiu naskiĝis ĉirkaŭ la revuo *Literatura Mondo*. Henri Vatré mem aktive partoprenis al la eldonado de tiu fama *Literatura Mondo*. Dum tri jaroj li vivis en Budapeŝto por alporti sian kunlaboron al la redaktora komitato kaj kooperativa eldonejo *Literatura Mondo*. Li havis la okazon ofte renkonti Kálmán Kalocsay, kaj li provis montri al siaj geaŭdantoj la gravecon de la influo de tiu verkisto sur la

disvolviĝon de esperanto mem kaj de ties literaturo originala kaj tradukita.

A. Kálmán Kalocsay estas nun konsiderata de la esperantistaro kiel granda poeto. Sed tio ne signifas, ke liaj verkoj estas multlegataj. Poezion ne facile komprenas la vasta publiko, kaj en esperanto ne abundas la pedagogoj, kiuj kapablas entuziasmigi aŭdantaron por poeziaj verkoj. Pro tio nia admiro al la talento kaj verkaro de Kálmán Kalocsay restas sufiĉe abstrakta.

Cl. En la revuo *Hungara Vivo* Ivo Lapenna, William Auld, Juan Régulo Pérez kaj Lajos Tarkony en artikoloj, kiuj honoras Kálmán Kalocsay, diras tion, kion ili ŝuldas al la ĉefredaktoro de *Literatura Mondo*.

A. Hodiaŭ ni pensas vin interesi citante el la artikolo de William Auld.

Cl. *Estas por mi...*

A. skribis William Auld,

Cl. ... *malfacile, oni povas diri preskaŭ neeble, skribi objektivite pri Kalocsay. Mi neniam renkontis lin, tre malofte ni interŝanĝis korespond-aĵojn, tamen lia granda influo formis la ĉefbazon de mia esperantista kultureco kaj lia verkaro estis la ekscita ĉefstudajo de mia privata esperantista universitato. De Zamenhof mi ensorbis la ideologion de la mondlingvo, sed de Kalocsay unuavice ĝian spiriton, ĝian esprimivon kaj ĝian poeziecon.*

A. En alia parto de tiu artikolo William Auld ankaŭ diras :

Cl. *La dua libro, kiun mi legis en Esperanto, estis la dantea « Infero »,*

la tria estis la madaĉa « Tragedio de l' homo » – hazarde elektitaj el libro-listo ; pri la tradukinto en tiu momento mi eĉ ne aŭdis, ĉar la movadon mi estis neniam kontaktinta. Prezentu al vi la efikon de tiuj grandiozaj originaloj en grandioza traduko sur la animon de poeziema 22-jarulo !

A. Poste William Auld parolas pri la verko de Kalocsay, kiu plejmulte influadis lin :

Cl. *Se, el la tuta verkaro de Kalocsay, mi devus nomi volumon, kiu plejmulte influadis mian tutan evoluon spiritan kaj kreaan, tio tamen estus la « Hungara Antologio » : Babits, Kosztolanyi, Szép kaj aliaj ŝajnis al mi miaj konatoj ne malpli ol la skotaj kaj anglaj poetoj de mia hejmlanda kulturo. Kiam miavice mi entreprenis tradukadon de tiuj lastaj, min subtenis en ĉiuj ŝajne neelireblaj dilemoj la penso, ke « Kalocsay tamen sukcesis ĉe Petöfi kaj Arany ».*

A. Estus bone, ke homoj kiel William Auld povu instrui la esperanto-literaturon al multaj studentoj. Kion li mem travivis en sia junaĝo, li devus povi nun transdoni al la junaj lernemaj studentoj. Kontraŭe ni ankoraŭ troviĝas en periodo, en kiu ĉiu estas devigata memlerni ĉion. Kaj ne abundas la William Auld, kiuj kapablas mem iri al la malkovro de niaj verkistoj.

Cl. Organizinte la unuan Kulturajn Semajnfinojn Esperantistan en Rennes apud Lausanne, ni volis iniciati la starigon de ia popola altlernejo, kie la svisaj esperantistoj povas ricevi instruon de kapablaj kaj talentaj esperantistoj. Serĉante personojn ka-

pablajn prelegi pri la esperanto-literaturo, ni konstatis, ke ili ne abundas, almenaŭ en Svislando. Verŝajne iomete samas en la aliaj landoj.

A. Atendante la belan tagon, kiu vidos la gefilojn de la esperantistoj povi frekventi kursojn, kiuj alportas la esencaĵojn de nia kulturo, ni revenas al William Auld. Jen kiel li priskribas la rolon de Kálmán Kalocsay :

Cl. *Nun Kalocsay atingis sian okdekajn jaron, kaj en tiu ĉi jaro aperos la tria el liaj novaj ŝekspirtradukoj – tradukoj, kiuj ne nur ne montras signojn de kadukiĝo, sed vere kaj efektive atingas novajn altojn de la tradukarto ! Antaŭ tia daŭra, vivolonga progresigo de la « plej malfacila el ĉiuj artoj » oni volas stari silente admiranta. Ke la tuta kulturo de Esperanto spegulas tiun progreson, ĉe kies pinto staris ĉiam Kalocsay, ĝin kvaŝaŭ post si trenante, estas la videbla pruvo pri la nesuperita rolo, kiun li ludis kaj ludadas en nia kulturmovado.*

A. Kaj jen tre grava diro de William Auld :

Cl. *Sen Kalocsay, oni eble devus cedi antaŭ la asertoj de tiuj filistroj neesperantistaj, ke Esperanto estas ĵargono senkultura kaj senliteratura. Pro li (pro liaj propraj verkoj, kaj tiuj, kiujn lia ekzempligo inspiris) ni povas fiere rebati, ke tiuj homoj tut-simple mensogas.*

A. Pri la influo de Kalocsay, William Auld ankaŭ diras :

Cl. *La influo de Kalocsay konsistas antaŭ ĉio el indiĝenigo de la formoj. Tiuj formoj, kiujn ni nun*

*akceptas senpense – aŭ eĉ jam ekevit-
tas ! ja ekzistis en multaj lingvoj, sed
en Esperanto ilia rajtigo estis hezita
kaj necerta. Post Kalocsay, ili fariĝis
niaj – oni povus diri : niegaj ! Kiam
ajn la historiistoj rigardos la inter-
nacilingvan kulturon, ili difinos al
Kalocsay elstaran lokon, ne nur kiel
al tradukisto, ne nur kiel al iniciat-
into de la matura versarto, sed an-
kaŭ al la poeto, kiu verkis multajn
senmortajn lirikojn.*

Victor Lebrun kaj Leo Tolstoj

*Ĉi-jare oni memoras pri la morto de
Leo Tolstoj en 1910. Eble bona
okazo por relegi la memorlibron de
Victor Lebrun, dum kelkaj jaroj la
sekretario de la fama verkisto.*

(rs) La intereso de Tolstoj pri
esperanto estas konata inter esper-
antistoj, precipe la eldiro ke li lernis
la internacian lingvon en kelkaj ho-
roj kaj poste kapablis almenaŭ legi
kaj kompreni tekstojn.

Victor Anatoleviĉ Lebrun nask-
iĝis en 1882 en Parizo kaj mortis en
1979 en Le Puy-Sainte-Réparate
(Francio). La patro estis inĝeniero
pri fervojoj kaj konstruis fervoj-
liniojn en Rusio. Pro tio lia filo
Victor Anatoleviĉ pasigis sian jun-
econ en diversaj, tre distance lokitaj
partoj de la cara imperio : infanaĝe
en Uzbekio, junulaĝe en Vladivos-
toko. La patro mortis en 1899 kaj
Victor veturis kun la patrino al
Moskvo kaj vizitis Tolstoj unuafoje
en la bieno Jasnaja Poljana. Li gvidis
sian vivon laŭ la pensoj de Tolstoj

A. Se vi deziras relegi tiujn dirojn
de William Auld, vi ilin serĉu en la
revuo *Hungara Vivo*, 1971, numero
3-a.

Cl. Vi aŭdis prelegon el Svis-
lando. La venontan semajnon ni fa-
ros al vi raporton pri la seminario
dediĉita al la aŭd-vida instruado, kiu
disvolviĝis en Bazelo fine de okto-
bro. Parolis gesinjoroj Claude kaj
Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

kaj de usona socia reformisto Henry
George kaj la ĝorgiŝtoj. La celo estis
vivi sobre de la produktoj de la tero
kaj havi grandan sendependecon sen
ekspluatado de aliaj homfratoj kaj
sen uzo de perforto. La unua parto
de la libro¹ « Majstro kaj disĉiplo »
enhavas la memorojn pri lia unua
vivperiodo kaj la dua parto « Duon-
jarcenton poste » estas dediĉita al la
rezultoj kaj direktivoj, sukcesoj kaj
malsukcesoj. Li priskribas la diver-
sajn facetojn de Tolstoj : pedagogo,
arta verkisto, religia reformisto, mo-
ralisto, scienculo, arta kritikisto,
sociologo. Cetere Tolstoj simpatiis la
neperfortan rezistadon kaj admiris
Gandhi.

La eldonisto Lina Gabrielli aver-
tas enkonduke ke ŝi nenion ŝanĝis
laŭ lingva vidpunkto. Pro tio sent-
iĝas la influo de la rusa lingvo kaj la
tendenco malŝpare uzi afiksojn, kion
hodiaŭ oni malpli ofte kutimas.

¹ Victor Lebrun : Leo Tolstoj, la homo, la
verkisto kaj la reformisto. Plejado, Eldono
Gabrielli, Ascoli Piceno, 1978.

Indekso enhava de *SES informas* Jaro 2010

Favore al retrovo de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo jen indekso de la pasinta jaro 2010.

La redaktoro : Claude Gacond.

Mallongigoj :

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

e-o = esperanto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonomo de

tp = titolpaĝoj

vd = vidu

Titolo de libro aŭ periodaĵo

A

Abreu Junco Jorge : n2p16.

Adelboden : n1p16, n2p14, n4p28.

Aebi Traugott Rinaldo : n4p2-3

Afrika Komisiono de UEA : n2p15.

Afriko : n1p18, n2p6, 11, 15, n3p12, 14, n4p11.

Akademiaj Studoj : n3p27.

Albogasio : n4p23

Aleksandro la 2a : n1p27-28, 30-31.

Aleksandro la 3a : n1p31-32.

Alemanio : n1p3, n3p3, 5, n4p2, 10.

Alimentarium de Nestlé : n1p19, n2p12.

Allemand Luc (Luko) : n1p3, 13, 22, n2p5, n3p5, 8-9, 24, n4p1-2, 8.

Alpoj : n4p23.

Altherr Anita : n3p11-12.

Ameriko : n4p7.

Amort Lucienne : n2p18.

Angers : n4p16.

Angolo : n2p15.

Anĝelmonto (Meyer) : n3p16.

Arai Toshinobu : n2tp.

ASEPAIX = Asocio Svisa de Edukistoj al la Paco : n4p16.

Astori Davide : n4p15.

Aŭstralio : n1p19, n3p20.

Aŭstrio : n1p33, n2p13, n4p22, 27.

Avenir suisse : n4p19.

Azio : n4p7.

B

Bachmann Louise : n4p2.

Baghy Julio : n4p9, 11.

Bakunin : n1p29.

Balkano : n3p19.

Banet-Fornalowa : n3p25.

Bapté Sami : n1p6.

Barato : n1p18, n3p20.

Bartoli Mara : n3p5.

Basel = Bazelo : n1p5, 14, 21, n2p8, 14.

Baur-Sallenbach Arthur : n3p12, n4p18.

BA = *Beletra Almanako* : n3p28.

Belgio : n2p6, n4p20..

Bélisle Marion : n1p15, n2p7, n3p5, n4p6.

Bélisle Romain : n1p15-16, n2p9.

Bélisle Samuel : n1p16.

Belov Stanislavo : n3p28-29.

Benino : n2p15, n3p12.

Berlin = Berlino : n1p13.

Bern : n1p4, n2p8, n3p16, n4p19.

Béroud-Focke Nicole : n3p1, 8.

Bialystok = Bjelostoko = Bjalistoko : n1p25, 29, n2p6.

Bienne/Biel : n1p4, n4p21.

Bilat Ailen : n1p6.

Bilat Sacha : n1p6.

Binningen : n2p14.

Blanc Maillard Charlotte : n2p8, 10, n3p13, n4p11.

Blanke Detlev : n1p37.

Bojesen Björn A. : n3p29.

Borsboom Ed(uard) : n1p14.

Borovko Nikolaj Afrikanovič : n1p28, n3p25-27.

Bosforo : n1p27.

Boulton Marjorie : n1p12, n3p25-26.

Bourlet Carlo : n4p26.

Brasikfolio : n3p12

Brazilo : n3p20.

Les Brenets : n1p15-17, n2tp, p1, 5.

Bringolf Alain : n1p3, 18.

La Brita Esperantisto : n3p18.

Brita Tutlanda Kongreso : n3p17

Britujo : n1p25, 27, n2p6, 14, n3p19.

Broc : n3p13.

Bronŝtein Mikaelo : n4p15.

Brun Sonja : n2p10-11, n3p14, n4p12.

Budapeŝto : n4p7.

Buhlmann David : n1p4, 17, n2p7, 10, n3p13, n4p2, 11.
Buller Osmo : n3p21.
Bulonjo-ĉe-Maró : n3p27.
Burundo : n2p15-16.
Butin : n3p27.
Buttex Yves : n3p13.

C

Calmy-Rey : n3p3.
Camenisch Arno : n4p23.
Canal Alpha : n1p5.
Carlevaro Tazio : n4p3.
Carlevaro Teresita : n4p3.
Carol Luiza : n1p24, n2p11, 17-20.
Centassi : n3p25.
Centovalli : n4p22
Centra Oficejo (UEA) : n1p6.
CDELI : n1p2-3, 11-13, 25, n2p3, 5, 13-15, 18-19, n3p8, 16, n4p2-3, 7-8.
Chapman Hilary : n3p17-18.
Chasseron : n1p16.
La Chaux-de-Fonds : n1tp, p2-7, 12, 16, 25, n2tp, 5, 7, 13-15, 17, 20, n4p7, 9-10, 18.
Chaves Gabriel : n2p12, n3p16, n4p2-3.
Chaves-Walder Verena : n1p19, n2p12, n3p5, 15-16, n4p2-3, 12.
Cherpillod André : n3p13, n4p11.
Christ : n1p3.
La Ciotat : n4p16.
Comenius-projekto : n3p19.
Common Charmian : n1p4, n2p9, n3p13.
Commungny : n1p4.
Comptoir Suisse : n4p7.
Comtesse Xavier : n4p19.
Les Convers (valo) : n1p22.
Cool Gerard : n2p13-14
Cork Françoise : n4p2.
Cornuet Didier : n1p4, n3p13.
Cortès Félix : n1p6.
Coté Florence : n2p13.
Cotton Armand : n1p17, n3p13.
Couturat Louis : n2p5, n3p8.
Cseh-Metodo : n4p7.
Cully : n1p4.

Ĉ

Ĉeftraĵoj de ekkonoteorio de la goeta mondrigardo kun aparta konsidero de Šilero (Steiner) : n1p24.
Ĉeĥio : n3p20.
Ĉerniŝevski Nikolao : n1p29.

Ĉinio : n1p18, n2p11, n3p14, n4p11.
La Ĉiulandulo : n4p18.

D

La danger lingvo (Lins) : n1p23.
Danio : n1p20.
Dardanela Markolo : n1p27.
Dasgupta Probal : n3p20.
Daubercies Sonia : n1p17, n2p10, n3p13, n4p11.
De Beaufront Louis : n4p8.
Le défi des langues (Piron) : n3p11
Dehms Jessica : n3p10.
Demmendaal Loes : n2p14.
De Mestral Dominique : n1p9.
De Mestral Elisabeth : n1p9-10, n3p4-5.
Derks Johan : n2p15-16, n3p4.
De Romo al Dubaj : n1p18, n2p10.
De Saussure René : n2p5, n3p8, 12, n4p8.
Descartes René : n4p9.
Dietterle : n3p25.
Dimcovski Eva : n2p10.
Di Vetta Arlette : n1p12, n3p1, n4p10-11.
Dostojevski : n1p29.
Dovat Lucienne : n3p9, n4p2.
Drezen Ernest : n1p33-37, n3p25.
Ducommun Edouard : n1p17.
Ducret Richard : n4p2.
Dumont Charlies & Suzanne : n3p13.

E

Eastbourne : n3p17.
EBEA = *Elektronika Bibliografio de E-aj Artikoloj* : n3p25.
Ebura Bordo : n2p15.
Ecole d'Humanité : n2p13.
Eichholz Rüdiger : n3p27.
Eisenegger Elisabeth : n4p2.
Ekzamena Komisiono : n1p7.
Elizabeth II : n3p17.
El la akaŝo-kroniko (Steiner) : n1p24.
El la germana poezio : n3p16.
Engel : n1p34.
Erasmus-Projekto : n3p19.
Erasmus School of Law : n4p7.
E-a Skiferio : n1p16.
La E-isto : n1p32.
E-o (UEA) : n1p23.
E-o aktuel : n3p27.
E-o à l'école : n4p10.
E-o-Amikaro de CDELI : n.
E-o-Centro de Seulo : n1 tp.

E-o, ĉu parazito? (Rid) : n3p17.
E-o en Afriko : n2p15.
E-o en Ruslando (Korĵenkov) : n1p37.
 EEU = E-o-Eŭropa Unio : n4p15.
 EK = Eŭropa Komunumo : n4p15.
E-o Katolika : n2p14.
E-o-Land : n1p13.
E-o lernejen : n4p10.
E-o-Semajnfino : n1p16.
E-o organizaĵoj lokaj :
Basel : ESB = E-o-Societo Basel : n1p14, n2p8, 14, n3p9, n4p9.
Bern : n1p14, n2p8, n3p10-11, n4p9.
Genève : E-o-Genève-Régions: n2p9-10, n3p12-13.
Genève : E-o-Grupo La Stelo : n1p5, 8, 17, n3p11-12, 15, n4p10-11.
Kantono de Neuchâtel : n.
Lausanne : LES = Laŭzana E-o-Societo : n1p17-18, n2p10, n3p13, n4p11.
Luzern : LES = Lucerna E-o-Societo : n1p18, n2p10-11, n3p14, n4p11-12.
Wil : E-o-Klubo Wil : n1p19, n2p12, n3p15-16, n4p12.
Zürich : ESZ = E-o-Societo Zürich : n1p19, n2p12, n3p16, n4p11-12, 18.
 E-o-Societo Südharz : n3p18.
Etnismo : n3p6, n4p25.
 EU = Eŭropa Unio : n2p9, n3p18, 31, n4p4, 29.
 Eŭropo : n1p11, 20, 26-27, n2tp, n3tp, p21, n4p4, 7, 15.
L'Express : n3p32.

F

Favre Alain : n3p1, 9.
 Federacia Konsilio : n4p26.
 Feigel Charles : n2p25.
 Fighiera Giancarlo : n3p19.
 Filali Renata : n4p2.
 Filmoj Nandir : n1p18.
 Finnlando : n4p26.
 Fischer Wolfram : n1p9-10, 19, n2p12, n3p3-5, 15, n4p12.
 Flawil : m2p12.
 Foix : n4p16.
Fondaĵo CH = Fondaĵo por la kunlaboro federala : n4p21-22.
Fondaĵo Oertli : n4p23.
 Fontanaz Nancy : n1tp, p3, 12-13, n2tp, p5, n3tp, p8-9, n4tp, p3, 8.
 Francio : n1p14, 27, n4p4-5, 16.

Frank Christoph : n4p6.
 Frauchiger Benno : n1p19.
 Frauenfeld : n4p21.
 Fregonara : n1p2.
 Freiburg (am Brisgau) : n1p14.
 Frejburga E-o-Grupo : n1p14.
 Fribourg : n2p8-9.
 Friedly Georgette : n3p13, n4p2.
 Friot Jean-Noël : n3p9.
 Friulo : n4p13.
 Fuchs Ernst : n4p25.
Fundamenta Krestomatio : n4p25.

G

Gacond Andrée : n1p12, n3p1, n4p2-3.
 Gacond Claude : n1tp, p3, 10-12, 17, 25, n2tp, p5, 14-15, 20, n3tp, p1, 4, 8-9, 12, n4tp, p2-3, 6, 8-10, 18.
 Gacond-Tzaut Jacques : n4p10.
 Gantert Ghyslaine : n3p13.
 Gaudin Jean-Loup : n3p13, n4p2.
 Gaxer Walter : n4p2.
 Geheeb Paulus : n2p13
 Genève = Genevo : n1p4, 6, 12, 23, n3p20, n4p7-8, 23.
 Germana E-o-Asocio : n3p19.
 GEJ = Germana E-o-Junularo : n1p20.
 Germanio : n1p32, n2p6, 15, n3p18, 31, n4p5, 27.
 Gernet Vladimir : n3p27.
 Giessner : n3p18.
 Gisiger Sabine : n3p4.
 Glättli Ernst : n4p2-3.
 Gora : n3p19.
 Gorecka Halina : n1p37.
 Goy Yvette : n1p4.
 Graf Bruno : n3p10, 12, 18-19.
 Granda Katerino : n1p26.
 La Granda Muro : n4p4.
La Grande Ourse : n1p6.
 Greklando : n2p14.
 Grin François : n4p19.
 Grizono : n4p23.
 Grodno : n1p29, n3p26.
 Grosjean Mireille : n1tp, p1-5, 8, 13, 15-18, n2tp, p1, 5, 9-10, 15, n3tp, p1-7, 9-10, 12, 32, n4tp, p1-3, 6, 16-17, 19.
 Grossmann Hans-Werner : n1tp, n2tp, p2-3, n3p1-3, 5.
 Gruyères : n3p13.
 Guézo Hubert : n3p12.
 Guillaume : n4p15.

Ĝ

Ĝingis-Ĥano : n4p4.

H

Haenni Ueli : n1p14, n2p8, n3p10-11, 32, n4p9.
Hamlet : n1p10.
Handzlik Georgo : n4p15-16.
Hankel : n3p27.
Harada Hideki : n2tp.
Harada Husako : n2tp.
Hasler John : n4p3
Haupenthal Reinhard : n1p12, n4p1, 25-26.
Havano : n3p20-22, n4p7.
Herzberg am Harz : n3p12, 18-19.
Higgins : n3p18.
Hindujo : n2p11, n3p14, n4p11.
Hiroŝima : n3tp, p32, n6p17.
Hiroŝima Centro por Senperforto kaj Paco : n4p16.
Hispanio : n2p6, n4p21.
Histoire de la Russie (Riasanovsky) : n1p26, 37.
Historiaj studoj (Drezen) : n1p34, 37.
Hitlero : n3p28.
Hodgers Antonio : n4p19-20, 25.
Hodler Hector : n1p23, n3p12, n4p9.
Hofmann Blaise : n4p23.
Holzhaus : n3p25.
Homaranismo (Zamenhof) : n1p11, n4p15-16.
Homarano (Korĵenkov) : n3p25.
Huguenin François : n2p17, 21, n4p2-3.
Huguenin Noël : n1p4, n4p2.
Humbert Marc : n4p2.
Hungario : n2p6, n3p18-19.

I

Ido : n2p5, n3p8.
Indonezio : n2p13.
Informilo de LES : n1p18.
IPB = I-a Buroo pri Paco : n4p16.
ICH = Interkultura Centro Herzberg : n3p19.
I-a Jura Revuo : n3p27.
ILEI = I-a Ligo de E-istaj Instruistoj : n1p4, n2p5-7, n3p9.
I-a Ekzamena Komisiono : n1p4.
I-a E-o-Instituto : n4p7.
IJK = I-a Junulara Kongreso : n1p20, n2p9, n3p20-22.

IKUE = I-a Katolika Unuiĝo E-ista : n2p14.
I-a Pedagogia Revuo : n2p6.
Intragna : n4p22.
Inversa Vortaro de E-o (Pabst) : n3p27.
Irano : n2p6.
IS : n2p9.
Israelo : n1p24, n2p19.
Itala Kongreso de E-o : n4p13-16.
Italio : n4p22,
Ivanov Slavik = Rahmonov Ĝoni : n3p28.

J

Japanio : n2tp, n3p10, 32, n4tp, p6, 11.
Jayet Marguerite : n1p4.
Jesuo : n2p14.
JES (junuloj) : n1p2, 4, n2p1, n3p1, 5.
Jobin Mariola : n2p7.
La Jonchère : n2p14.
Le Jour étoilé = *La stela tago* (Carol - Muriset) : n1p24, n2p11, 17, 29.
Juna Amiko : n2p6.
Junulara E-o-Semajno : n1p20.
Torkvato Tasso (Goethe) : n1p24.

K

Kalocsay Kálmán : n2p5, n3p8, n4p9, 11.
Kanado : n2p13-14.
Kant Immanuel : n2p19.
Kanzi Itó : n3p25.
La karnavalo de Venecio : n2p10.
Kastelo de Chillon : n1p18, n2p12.
Katerino la 2a : n1p28.
KCE = Kultura Centro E-ista : n1p13, 16, n2tp, p5, 7, 13, n3p8, n4p2, p7, 10.
Kee Lee Jung : n1tp.
Kelkaj tagoj en Dubajo : n2p10.
Kelkaj tagoj en Muskato : n2p10.
Keller-Bissegger Heidi : n1p4.
Keller Stefano : n1tp, p1, 3-4., n2tp, p2, n3tp, p1-2-4, 7, 9, 15, n4tp, p1-2, 7-8, 19.
Kelso David : n3p18.
Kembriĝo : n3p18.
Kimo (kantisto) : n1p20.
Karnavaleto (Tzaut) : n4p10.
Katekismo de la revoluciemulo (Neĉajev) : n1p30.
La Kernpunktoj de la sociala demando... (Steiner) : n4p30.
KAEM = Komisiono pri Azia Esperanto-Movado : n1tp.
KER : n2p6.
Kimrio : n3p17.

Koiro = Chur : n4p22, 25.
Kolektaĵo CH : n4p23.
 Koller Alois : n4p2-3.
 Komo = Como : n4p23.
Komunista Manifesto (Marx) : n1p34.
Konfesoĵoj de malaperintaj lokoj (Myftiu) : n4p23.
 Kongreso de la Sovetoj : n1p34.
 Konkurso : n1p5-8.
Kontakto : n3p27.
 Kooperativo de Literatura Foiro : n1p13, n4p10.
 Koreio : n1tp.
 Korĵenkov Aleksander : n1p37, n3p25-26.
 Kováts Katalin : n3p22.
 Krakovo : n1p20-21.
 Krasko : n3p25
 Krasnikov Oleg : n1p37.
 Krimea Milito : n1p27.
La kristanismo kaj mistika fakto kaj la misteroj de la antikveco (Steiner) : n1p24.
 KS = Komuna Sem inario inter junuloj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio : n2p9.
 Korody Zsafia : n3p19.
 Kováts Katalin : n4p15.
 Krokodilado : n4p27-30.
 Kubo : n2p6, 16, n3p16, 20-22, n4p12.
 Künzli Andreas: n3p12-13, n4p31.
 Kultura Konsilio (KCE) : n2p7.
 Kultura Seminario : n1p12.
Kurso agrikultura (Steiner) : n3p16.
 Kyoto : n4tp.

L

Lagrange Georges : n1p12.
Der Landbote : n4p18.
Le langage secret de Peter Jameson : n1p16.
 Lapenna Ivo : n1p23.
 Latisana : n4p13.
 Lausanne = Lauzano : n1p5, 11, n2p14-15, n4p7, 22.
 Lavanchy Jean-Jacques : n1p4, n3p9, n4p3.
 Leibnitz : n2p13.
 Leibniz Gottfried Wilhelm : n4p9.
 Lenino : n1p34.
 Lenk : n1p6-7, n3p6.
 Leuthard Doris : n4p26.
 Libro-Foiro : n2p9-10, n3p12-13.
 Lignano Sabbiadoro = Linjano Orsabla : n4p13.
Lingvo I-a : n3p27.

Lingvo I-a de Doktoro Esperanto : n1p10-11, 32, n4p9.
 Lins Ulrich : n1p23.
 Llandudno : n3p17.
 Le Locle : n1p16-17, n4p6.
L. L. Zamenhof... Esperanto, Hillelismus... und die jüdische Frage... (Künzli).
 Löwenstein Anna : n3p17.
 Londono : n3p18.
 Ludovikito : n1p13.
 Ludwig Edmond : n1p14.
 Lugano : n4p23

M

Maalouf : n4p15.
 MacGill Stefan : n2p6-7.
 Madagaskaro : n4p7.
 Magetti Daniel : n4p22.
 Maimon : n3p25.
 Maissen Theo : n4p23.
 Majuko Tajima : n1p15.
 Malagasujo : n2p15.
Manlibro de Politiko (Maul) : n3p27.
 Maradan Mélanie : n3p12-13, n4p2.
 Margot Nicole : n1p4, n3p2, 4, 6, 9, n4p13, 16, 19, 27.
 Marin : n2p11, 29.
 Marsaille : n4p16.
 Marti José : n3p21.
 Martinelli Perla : n2p7, n4p10.
 Marx : n1p34.
 Masson : n3p25, n4p19.
Le Matin : n4p19.
 Maul Stefan : n3p27.
 Maŭricio : n4p7.
 Mediteraneo : n1p27.
 Meier Hans : n3p1.
 Meintel Katja : n4p23.
 Mendrisio : n4p23.
 Mersenne : n4p9.
 Métabief : n2p4, 12, n3p5-6, 16, n4p1, 5-6.
 Meyer Conrad Ferdinand : n3p16.
 Michaux Alfred : n3p25-27.
 Milanović Svetlana : n2p15.
Mil unuaj vortoj en esperanto : n1p16.
 Minnaja Carlo : n2p7.
Minority Research Network : n4p7.
 Mirejo ps Grosjean Mireille.
 Miskole : n3p18.
La mistiko en la komenco de la novtempa spiritovivo kaj ĝia rilato al la moderna mondriĝardo (Steiner) : n1p24.

Miyoshi Etsuo : n4p4.
Moine Martine : n3p12-13
Molnar Monika : n1p3-4, 6, 13, n2p5, n3p8-9,
n4p8.
Monato : n3p27.
Le Monde : n4p4.
La mondrigardo de Goeto (Steiner) : n1p24.
Mongolio : n2p12, n3p15.
Montpellier : n4tp.
Mont-Soleil : n4p10.
Moravio : n4p22.
Moret Sébastien : n1p11, 25, 34, 37.
Morocz István : n3p4.
Morocz Piroska : n1p4, n4p11.
Moskvo : n1p33-35.
Moyadé Déla Ezin : n2p16.
Müller Geneviève : n1p16-17.
Müller Jeanne-Marie : n1p16.
Mfänger Marie-Louise : n1p11, n2p14-15,
n3tp, p3, 5, n4tp, p1.
Mulhouse : n3p9, n4p9.
Munkeno : n1p21.
Murat : n3p10.
Muriset Steve : n1p24, n2p17-120.
Muzeo de la Paco : n3p32.
Myftiu Bessa : n4p23.

N

Nagasaki : n3p32.
Napoleono la 3a : n1p26-27.
Nečajev Sergej : n1p30.
Nederlando : n2p13-15, n3p4, n4p20.
Neregistaraj Organizaĵoj : n4p7.
Nerono : n3p17.
Neuchâtel : n1p5, 18, 24, n2p11, 14, 17-18,
n3p32, n4p18.
Neue Berner Zeitung : n4p18.
Navado : n3p32.
La Nica Literatura Revuo : n1p12.
Nicolas Yves : n4p16.
Nicolet Bernard : n3p1.
Nicolet Claire : n1p4.
Niedersachsen : n3p18.
Nigra Maro : n1p27.
Niĝerlando : n2p15.
Nikolao la 1-a : n1p25-27.
Nikolao la 2a : n1p31-32.
Nilsson Bertil : n2p7.
Nobel-Pacpremio : n4p16.
Nourmont Claude : n4p16.
NR : n2p9.
NRO = Ne-Registara Organizo : n1p4, n4p8.

Nüesch Willy : n1p24, n3p10, n3p16, n4p30-
31.
Nurenbergo : n1p32.
NZZ am Sonntag : n4p20.

O

Okamoto Mitsuo : n3tp, n4p17.
Okayama : n2tp.
Olten : n2p3.
La Ondo de E-o : n1p33.
ONG = Neregistaraj organizaĵoj ĉe UN :
n4p7.
Orban Leonard : n4p15.
Orelli Giovanni : n4p23.
Ortelli Luciano : n4p3.
OV = *Originala Verkaro* (Zamenhof) : n3p25.
OSIEK-Konferenco : n3p19.
Oslo : n4p16-17.
Otomana Imperio : n1p27.

P

Pabst Bernhard : n3p25-27, n4p25.
Pakistano : n2p6.
Parizo : n3p20, n4p4, 25.
Parlamento de la Kantono de Neuchâtel :
n1p3-18.
Parmo : n4p16.
Parzival : n1p4, n4p2.
Pasporta Servo : n1p2, 21, n3p1, 3, 5.
Pedretti Erica : n4p22.
Peer Oscar : n4p22.
Penedorf : n3p27.
Périgueux : n4p16.
Pétermann Françoise : n4p3.
Petoteko = *Perkomputora Termino-Kolekto* :
n3p27.
Perret François : n1p17.
La Petite Camargue Alsacienne : n1p14,
n2p8, n3p9.
Phillipson Robert : n4p7.
Piemonto-Sardujo : n1p27.
Piron Claude : n1p12, 17, n3p11-12, n4p10.
Piron Nicole : n4p10.
Pirro : n4p9.
Pitzner : n3p18.
Plena Gramatiko de E-o : n2p5, n3p8.
PVZ = *Plena Verkaro de Zamenhof* : n3p25.
Pochanke Barbara : n1p4, n2p3, 12, n3p2-3,
15.
Pogodin : n1p27.
PEJ = Pola E-o-Junularo : n1p20.
Pollando : n1p20, 25, 32, n2p6, n4p16, 22.

Portugaliao : n2p6.
Postnikov A. : n1p33.
Poznan : n2p6.
Prilly : n1p4.
Privat Edmond : n3p12, 25-27, n4p9, 18.
Pro Helvetia : n4p22-23
Prudento kaj kredo (Tolstoj) : n1p32.
Prusujo : n1p25.
Pully : n1p12.
Pusterla Fabio : n4p22.

R

Randin François : n1p17, n2p10, n3p9, 13, n4p11.
Reale Cesco : n1p4-5, 18-19, n2p11-12, n3p4, 14-15, n4p11-12.
REF : n2p9.
Regiona Staĝo de E-o : n1p14.
Reichen Christian : n2p18-19.
Reichen Elizabeth : n3p32.
Reinach : n2p14.
Rememoroj de centprocenta e-isto (Saharov) : n1p34, 37.
RERO : n1p15, n2p13.
Restaurant Esperanto : n3p10
Rey Anna : n1p18, n2p10-11, n3p14, n4p12.
Rey Konrad : n1p18, n2p10-11, n3p1, 14, n4p12.
Reymond Mady Lynn : n4p2.
Riasanovsky N. : n1p26, 37
Richterswil : n3p3, 5, n4p1, 6.
Rid Hju : n3p17.
Rieser Willi : n4p2.
Rittmeyer Charles : n2p14.
Roesser Michael : n1p19, n2p12, n3p16, n4p12.
Roget Jean-Claude : n3p1.
Romandio : n1p3, 5, 15, n3p3-5.
Rooke Dieter : n2p3, n3p3, 20.
Roterdamo : n2p6.
RS-TS – Rencontres Suisses – Treffpunkt Schweiz : n4p21.
Ruchti Daniel : n1p14.
Ruĝa Kruco : n4p7.
Rumanio : n3p5
Rumonge : n2p16.
Ruslanda E-ista Kongreso : n1p33.
Ruslanda E-ista Ligo : n1p33.
Ruslanda E-isto : n1p33.
Ruslando = Rusujo : n1p11, 25-34, 36-37, n4p25.

S

Saarbrücken : n1p7.
Sainte-Croix : n2p14.
Saint-Louis : n3p9.
Sandoz André : n4p2-3.
Sankt-Gallen = Sangalo : n1p1, n2p12, n4p24.
Sankt-Peterburgo : n1p30, 32-33.
La Sankta Tero : n1p27.
Sanz Markus : n3p11.
Saharov Aleksandro : n1p34, 37.
SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda : n1p2, 35, n2p1, n3p1, 5.
SAT-Amikaro : n1p2, n2p1, n3p1, 5.
Saut-du-Doubs : n1p17.
Scherer Paul : n2p10-11, n3p14, n4p2, 12.
Schleyer Johann Martin : n4p9.
Schneller Martine : n1p13, 24, n2p17-19.
Schneller Richard : n1tp, p3, 23, n2tp, p17, n3tp, p4, 25, n4tp, p19.
Schily Otto : n4p30.
Schoeni Bartili Daniel : n3p9.
Scholl Claude : n3p13.
Sebastopolo : n1p27.
Senn Hans-Peter : n1p14, n2p8, n3p9..
Sentinelles : n4p7.
Seulo : n1tp.
Siberio : n1p34.
Signal de Bougy : n2p10.
Sigrist-Gaehler Liliane : n3p2, n4-p3.
Silfer Giorgio : n2p7, n4p10.
Simpozio de UEA pri Lingvaj Rajtoj ĉe UN : n4p7.
SFERO = Svisa FERIA E-a Renkontiĝo : n1p2-3, 7, n2p4, 9, 12, n3p1-2, 5-6, 16, n4p1-2, 5-6.
Skutnabb-Kangas Tove : n4p7
Sola (Kimo) : n1p20, n2p1.
SEU = Sovetlanda Esperantista Unuiĝo : n1p35, 37.
SIS = Svisa ILEI-Sekcio : n1p2, n2p1, n3p1, 5.
Societo por Minacataj Popoloj : n4p7.
Sovetio : n1p11, 25, 33-37.
Spalinger Alfred : n2p7, 14.
Spalinger-Favre Berthe : n2p7, 14.
Springboard : n3p18-19.
Srilanko : n4p7.
Stakian Armène : n3p13.
Stakian Madeleine : n3p12-13.
Stalino : n1p36-37.
Steiner Rudolf : n1p24, n4p30-31.
La stel(plen)a tago (Carol - Muriset) : n1p24, n2p17, 19-20, 29.

Stettler Edouard : n3p12.
 Strasburgo : n4p16.
 Stride François : n3p12, n4p11.
 Sud-Koreio : n1tp.
 Süskind Patrick : n3p29.
 SES : n2p7-8, 13, n4p2, 5, 7-8, 16, 18.
 SES-Estrarkunsido : n4p1-2.
 SES-Ĝenerala Kunveno : n1p1-8, n2p1-3, 12, n3p1-6, n4p24.
SES informas : n1p3, n2p16, n3p2, 4-5, 15, 21, n4p1, 7-8, 17, 31.
Svisa Antologio : n3p12
 Svisa Koruso (Etoy) : n3p1, 5, n4p24.
Sonorilo de paco : n1p15.
La Sonilo Malgranda : n4p18.
 Sovetio = Sovetunio : n1p25, 33-37.
SRG SSR – idée suisse = svisa ideo : n4p21, 23.
 Stakian Madeleine, n1p17.
 Steiner Rudolf : n3p16, n4p30-31.
 Stoke-on-Trent : n3p18.
 Strappazzon, Stéphanie : n1p17.
Studoj : n2p5, n3p8.
 Svedio : n3p21.
 Svisa Asocio de Edukistoj al la Paco : n3tp.
Svisa Espero : n4p18.
 Svisa ILEI-Sekcio : n2p5-6.
 Svisa Kurtonda Servo : n4p18.
 Svisa Muzeo de la Ludoj : n1p18, n2p11-12, n3p11, 14-15, n4p11.
 Svisa Radio Internacia : n4p24.
 Svislando : n1p20-21, n2p4-7, 9, 13-15, n3p2, 20, 30-32, n4p3, 5, 16, 19-24, 26-27, 29.
 Syozi Keiko : n1p13.
 Szerdahelyi István : n2p5, n3p8, n4p9.
 Š
 Ŝlosilo ps Kee Lee Jung.

T

Taeuber-Arp Sophie : n2p11, n3p14.
 Tahira Masako : n4tp.
 TAKE : n1p14.
 Tanganjiko : n2p15.
 Tanner Adrian : n4p2.
 Tanzanio : n1p14.
 TEJO = Tutmonda E-o-Junularo : n1p20, n3p21.
 Telier Angela : n3p18.
Le Temps : n4p20.
Terminoteko : n3p27.
Terre des Hommes : n4p7.
 Thien Henk : n3p26.

Thum Jeanette : n1p16.
 Thum John : n1p16.
 Tiĉino : n1p3, n3p3, n4p1, 22.
 Tilsit : n1p25.
 Tirano : n4p23
 Tiŝlar : n4p15.
 Togenburgo : n4p24.
 Togo : n2p6, 15-16.
 Tokyo : n1p13, n2tp, n3tp.
 Tolstoj Lev : n1p32.
 Torino : n4p16.
 La Tour-de-Peilz : n1p4, 18, n2p11-12, n3p4, 11, 14, n4p11-12.
 Tours : n4p16.
 Traktato de Lisbono : n4p15.
Tra la kanalo de Suez Randin) : n1p18.
Tra l'mondo (Tzaut) : n4p10.
Tribune de Genève : n4p19.
 Triesto : n4p13.
 Trifonĉovski Ljubomir : n2p7-
 Turkujo : n1p27.
 Tzaut Olivier : n4p9-10

U

Ukrainio : n1p34, n3p21.
 UEA : n1p1, 4, 23, 35, n2tp, p1, 6, 13-14, 16, n3p2, 16, 20-21, n4tp, p7-8, 16, 18.
 UMEA : n4p7.
Universalaj Lingvoj en Svislando : n3p13.
 UNESCO : n1p1, n2p1, 6., n4p2
 UNIFEM : n3p6.
Unua Libro : n4p25.
 Unua Mondmilito : n1p33, n4p30.
Universal Glot de Pirro : n4p9
 UK = Universala Kongreso : n2tp, p6, 9, 12, 16, n3p16, 19-20-22, n4p7, 12, 16.
 Universala Medicina E-o-Asocio : n2tp.
 Universitato de Lausanne : n1p11, n4p22.
 Universitato de Parmo : n4p15.
 UN = Unuiĝintaj Nacioj : n1p1, 4, n2p1, 9, n3p6, 13, n4p7-8.
Update : n3p18.
 Usono : n3tp.
Utila Estas Aliĝo, Tra la unua jarcento de UEA : n1p23.

V

Van Puijenbroek Ruth : n1p4, n4p3.
 Val-de-Ruz : n2p14.
 Vaud = Vaŭdo : n1p5.
 Valais = Valezo : n1p5.
 Vallorbe : n2p4, n3p6, n4p5-6.

Valpen Armin : n4p23.
Varsovia Vento : n1p20.
Varsovio : n1p32, n2tp.
La vekigo de la animoj (Steiner) : n1p24.
Venecio : n4p13.
Vergara José Antonio : m3p21.
Vevey : n3p14, n4p1.
Vieno = Wien : n4p25-26
Virédaz Marguerite : n4p3.
Vité Paula : n3p13, n4p3.
Vitry Noëlle : n4p3.
Von Büren Jean Thierry : n3p1, 9.
Vero kaj scienco (Steiner) : n1p24.
Vevey : n2p8, 11.
Vikipedio : n4p24.
Villers-lès-Nancy : n1p14.
20 Minutes : n1p5, 7-8.
Volapük de Schleyer : n4p9.
Volapuka movado : n4p25.

W

Wakayama : n1p15.
Walter Gerhard : n3p18.
Waringhien Gaston : n2p5, n3p8, 25, n4p9.
Wasserwendi : n2p13.
Weidmann Dietrich : n1tp, p3-5, n2tp, 7, n3tp, p1, 3-5, 9, 12, n4tp, p1, 3, 6.
Weidmann Linda : n3p5.
Weidmann Nelida : n1tp, n2tp, n3tp, p1, 3, 5, n4tp, p1, p3, 6.
Wells John : n3p17.
Welsch Madeleine : n2p14.

Werner Erich : n4p3.
Westemeier Manfred : n1p14.
Die Wien-Aufenthalte von Lazar Markovič Zamenhof : n4p26.
Wiesbaden : n4p31.
Wil : n1p1, 4, n2p1, n3p1, 24, n4p24.
Wilson Richard : n3p13.
Winterthur : n1p1, 4, n4p18.
Wisniewski : n3p25.
Wittenbach : n1p23, n2p17, n3p25.
Witterjik : n3p27.
Wunsch-Rolshoven : n1p13.

Y

Yelabuk pedipedelas : n4p9.
Youtube : n4p10.

Z

Zaft Sylvain : n1p16.
Zakopane : n1p20-21.
Zamenhof Lazaro Ludoviko : n1p3, 9-11, 14, 17, 25, 28, 30-33, n2p8, 10, n3p9, 14, 19, 25-27, n4p4, 9, 11, 15, 25-26, 28, 31.
Zaslavsky Véra : n3p9.
Żebrowski Łukasz : n3p21.
Zilvar Peter : n3p19.
Ziółkowska Maria : n3p25-27.
Zoller Marie : n2p9.
Zollkofen : n1p15, n3p10-11.
Zürich = Zuriko : n1p4-5, n4p24.

-oOo-



Svisa kalendaro

2011 Januare

- 5 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 22 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Februare

- 2 : Wil : EKW : Ĝenerala kunveno.
- 5 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 7 : Lausanne : LES, Ĝenerala Asembleo.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Marte

- 7 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 9 : Genève : La Stelo, Ĝenerala Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 26 : Lugano : Ĝenerala Asembleo de SES.
- 27 : Lugano : Plua restado kun Mireille Grosjean.

Aprile

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.

Maje

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 21 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Junie

- 18 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 18 : Lausanne : LES-Ekskurso.

Julie

- 1 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Aŭguste

- 27 : Chaux-de-Fonds : SES-Festotago.

Septembre

Oktobre

- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Novembre

Decembre

- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Peto de la redaktoro

Bedaŭrinde la redaktoro kapablas anonci nur tion, kio estis sciigita al li. Tial li petas la asociojn kaj grupojn konigi la okazontaĵojn ne lastminute, sed konsiderante la redaktajn datlimojn, kiuj estas anoncitaj en la kalendaro. Ankaŭ raportoj pri la okazintaĵoj bonvenas.